



22-a Jaro N-ro 235-236 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-lu, Japanujo.
Abonprezo: ¥ 240 por unu jaro; \$ 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando: Abonebla
ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwestraat 172, Den Haag, Nederlando

U. H. A. estas Ideologia Movado

Onisabro Deguçi

Fronte la maltrankvilan socistaton internan kaj eksteran, mi havas ion por averti vaste al ĉiuj. Tio estas: Oni povas mortigi la korpon de homo, sed neniel la animon. Mia diro estas tia banalaĵo, kiun ĉiu facile havas sur siaj lipoj. Sed fakto estas, ke nur malmultaj scias la veran signifon de tiu animismo. Tro malmultaj vivas aŭ kondukas konforme al tiu vero.

En la pasinteco okazis ofte, ke kelkaj zelotaj patriotoj murdis kiujn ili konsideris ribelaj protokanajloj, aŭ ke patriotoj renkontis miskomprenon de la popolo kaj estis masakritaj de siaj opoziciaj partianoj. En ambaŭ okazoj, oni devas scii, ke ilia animo ne nur postvivis, sed ekposedas la animon de la posteuloj havantaj la korpon kaj plu donas al ili tian influon, ke la postsekvoj estas ĉiam pli mizeraj ol antaŭe. La animo de lojalistoj eterne vivadas same kiel tiu de mallojalistoj.

Epizodo el la vivo de la fama feŭdestro Mitukuni Tokugawa (1628-1700) rakontas al ni, kiel li pritraktis krimulon kondamnitan je morto. Tiu ĉi krimulo ne konis la *vojon*. La feŭdestro intervenis kaj prokrastigis la ekzekuton, donante al li la okazon lerni ion el la konfucianismo. Tri jarojn poste nur kiam li konvertiĝis, li estis — ekzekutita. Mitukuni estas laŭdinda en tio, ke ĉe li, ne la puno estis unua faktoro en la plibonigo de la socio.

La Movado de Universala Homama Asocio estas ideologia. Ĝi celas konduki homojn al Dio kaj konverti ilin.

(El verko de 1935).

Dek Gvidprincipoj de la Oomoto-Movado (5)

6. *Politiko, ekonomio, edukado, artoj kaj ĉiuj aliaj branĉoj de la homa aktivado estu gvidataj laŭ religiaj principoj tiel, ke ili kontribuu en la formado de la ideala homara kulturo de la mondo.*

Ĉi tie okazus demando, kial Oomoto tuŝas en siaj religiaj principoj kaj politikon kaj ekonomion. Por respondi tiun demandon necesas unue klarigi pri la signifo de “religio”, laŭ kiu Oomoto uzas la vorton. Difini kio estas “religio” tute ne estas facila tasko kiel evidentas el la fakto, ke da difinoj pri ĝi ja ekzistas iudire cent kelkdek. Ĉu pro tio aŭ alio, la japana Religia Jurpersona Leĝo evitas en si pritrakti la difinon de la vorto “religio” mem, kaj nur koncerne al “religia organiz-aĵo” la leĝo difinas kiel asocion organizitan kun la celoj: “disvastigi religiajn doktrinojn, plenumi ritojn, kaj tiel inici aŭ klerigi la adeptojn”. Krome ĝi ankaŭ kondiĉigas la instalaĵojn por kultado.

Nu, kio estas religio laŭ la Oomota vidpunkto? Majstro O. Deguĉi iam klarigis sub la titolo “Kio estas vera religio?”:

“La vorto 宗教 (‘syūkyō’ ekviv-alenta al: religio) implicas malkovri al la homoj la fundamentan veron de la ĉielo, tero kaj homo, konduki la homon laŭ Dia Volo kaj tiel doni pacon al la homaro kaj tuta kreitaĵ-

aro. Do, religio esence estas io, kio devas doni la fundamentan solvon pri ĉiuj problemoj: pri la fenomenoj ĉielaj kaj teraj, politiko, ekonomio, edukado, arto, ktp.

“Sed la ekzistantaj religioj troigadis aŭ la ĉielon, aŭ la teron, aŭ la spiritan regnon, ofte forgesante lukti rekte kun la problemoj de la homa mondo. Por ekzemplo, nia mondo sur la tero iam estis alnomata ‘la abomena kaj malpurega lando plena de suferoj kaj afliktoj’ kaj malrespektata, por ke la homoj sin turnu — al la ĉielo, sen rekta kontakto kun la homaj problemoj sur la tero. Hodiaŭ, inter la modernaj religioj eĉ troviĝas kelkaj, kiuj konsideras sin ‘religio’ predikante al homoj nur moralajn aŭ etikajn principojn. Ankaŭ la malnovaj donadis al homoj tro da malpermesoj kaj tabuoj, kiel ekzemple, la ‘Kor-reguloj’, ‘Ok Polvoj en la Homa Koro’, ‘Kvin Komandoj’, ‘Dek Komandoj’, ktp. Sub la influo de tiuj vortoj Dio fariĝis pli kaj pli timinda Superreganto Sankta, tamen kvazaŭ despota, al kiu la homoj ne povas aliri.

“Homoj denaske povoscias distingi bonon de malbono. La religia instruo meritas sian nomon kaj havas aŭtoritaton, nur se ĝi rivelas al homoj la veron, kiun ili ne povas atingi per sia propra scio. Anstataŭ doni ĝin, la ĝisnunaj religioj donadis al homoj

pli da malbona influo, ol da bona, pli malpurigis la spiritojn de homoj, ol purigi, kaj kelkaj eĉ okazigis militojn en sia nomo. Religio en la vera senco de la vorto devas enteni la veron por gvidi la homaron kaj regadi ĉion sur la tero.” (El verko de O. Deguĉi, 1928)

*

La esprimo 祭政一致 (‘saisei itti’) signifas, ke la “diservo” kaj “regado” estas identaj. La *maturigoto* (祭事: diserva afero) estas identa kun la *maturigoto* (政事: regada afero). El tio sekvas, ke la diservo, regado kaj edukado estas unu kaj nedisigeblaj unu de la alia. El la Oomota vidpunkto, mi asertas, ke ĝis hodiaŭ sur la tero neniam ekzistis “regado” en la vera senco, sed ekzistis nur “politikoj” manovraj kaj makiavelaj. El tio rezultis la ĥaoso de la mondo anstataŭ la harmonio kia regas en la ĉielo. La esenco de politiko (regado) kuŝas en la efektivigado de tiu harmonio, tiel sur la tero kiel en la ĉielo.

Same el la Oomota vidpunkto, mi asertas, ke la hodiaŭa ekonomio eraras, ĉar ĝi ignoras Dion, kiu estas la granda “mondbienulo”, la granda “kapitalisto” kaj la granda “produktanto”. La rajton posedi teron havas neniu homo, sed Dio. Por uzi ekstreman metaforon, homoj vivas sur la tero, kiel pedikoj sur homa korpo. La fontkapitalo de mondiriĉo kuŝas en la naturo — la favoro de Dio, kiu estas la granda “mondbienulo”. Ĉar la vera “produktanto”

estas Dio, homoj ne kapablas krei eĉ polvon da io ajn. Homoj nur kapablas priprocedi ion, sed nenion krei. La rikoltojn de farmistoj oni nomas “produktaĵoj”, sed tio ne estas la ĝusta nomo tial, ke la farmistoj faras nur la laboron de prizorgado: ili plugas teron, semas, sterkas, sarkas; unuvorte ili kultivas por helpi alporti la “produktaĵojn” de Dio, kiu estas la granda “produktanto”. Sen la suno, sen la pluvo, sen la tero ili ne povas helpi alporti eĉ unu grajnon de rizo, nek unu folion de brasiko. Sen la favoro de naturo aŭ Dio, nenio fariĝas “produktaĵo”. La esenco de ekonomio — por la riĉo kaj bonfarto de la tuta homaro — kuŝas en tiu vero.

*

Arto, same kiel religio, estas manifestiĝo de la spirito. Ambaŭ estas paro nedisigebla. Se al la moderna epoko mankas grandioza arto, tio venas de la manko de religiaj ideoj ĉe la artistoj. La tri ĉefaj faktoroj de kulturo konsistas el spirito, scienco kaj arto, kiuj ĉiuj fontas el religio. La Azia kulturo iam floradis dank’ al Budaismo, la Eŭropa dank’ al Kristanismo, la Araba dank’ al Mahometanismo, ktp. En ĉiu kulturevoluo religio ludis la gravan rolon de motoro. Hodiaŭ la mondo staras en la grava momento, kiam ĝia nova kulturo devas disvolviĝi dank’ al la forto de grandioza nova religio.

7. *Religio rilatas kun scienco, kiel spirito kun korpo. Ambaŭ kune kontribuas por la progresigo kaj bonfarto de la homaro.*

Religio kaj scienco estas ofte konsiderataj kontraŭstari unu la alian, sed ambaŭ estas nedisiĝeblaj kiel spirito kun korpo en la homo. Se religio kontraŭis sciencan aŭ la racian, ĝi ne nur estus superstiĉo, sed ankaŭ donus al la socio teruran malbonon. Azio estis la origino de religioj: per ili ĝi kontribuis al la mondkulturo. Sed ĝi devis esti subpremata sub fremdaj potencoj pro tio, ke ĝi ignoris sciencan, politikan kaj ekonomian. Oni povas diri ke la revekiĝo de la aziaj popoloj okazis nur post la 2-a mondmilito. Eŭropo kaj Ameriko kontribuis por la mondkulturo per scienca agado.

STAFETO-Libro

G. Waringhien: LINGVO KAJ VIVO

Esperantologiaj eseoj: elĉerpa analizo de la lingvo de Zamenhof. 452 paĝoj.
Broŝ. \$ 3.40; tolbind. \$ 4.00

M. Boulton: EROJ

Originala poemaro: Eroj kaj aliaj. 368 paĝoj. \$ 2.40

Sekvas:

Tibor Sekelj: Nepalo malfermas la pordon. Ĉ. 300 p. **Leander Tell:** La vela subtera mondo. Ĉ. 150 p. **Baldur Ragnarsson:** Ŝtupoj sen nomo. Ĉ. 120 p. **Reto Rossetti:** Pinta krajono. Ĉ. 120 p.

La librojn liveras la eldonisto, J. Régulo Pérez (La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj), UEA, kaj ĉiuj libro-servoj de la Movado.

Tamen en la atomepoko, en kiu ni vivas, la scienco minacas la vivon de la tuta homaro. La ĝenerala sekretario de la Scienca Akademio de Usono pravas dirante (proksimume) "La nuntempa scienco bezonas nur duonan tagon por detrui la tutan mondon. Tamen la problemoj ne kuŝas en la scienco mem, sed en la homo. La homo devas esti reformita. Ni scias, ke la ĉiam pli kaj pli altkvalitaj telekondukataj armiloj elfariĝas, sed kion la mondo vere bezonas, tio estas la homoj de Dio kondukataj." Scienco kontribuas por la progresigo kaj bonfarto de la homaro, nur kiam ĝi estas aplikata per "amo", t.e. la esenco de religio. O. Deguĉi instruas: "La hodiaŭa naturscienco faradas grandan laboron aplikante la energion de pozitiva kaj negativa elektro. Tio estas praktika apliko de la forto de "amo" latent en la materio. Se la scienco sukcesos apliki al si la "amon" de la homo, nur tiam ĝi realigos la idealan mondon sur la tero. Nur tiam la scienco estos kompleta en tia formo, kia ĝi devas esti. Nur tiam la scienco kaj religio unuiĝas en la vera senco."

La mondo nun iras la vojon de unueciĝo. Tio, kion la homaro aspiras, estas la fondo de la vera mondkulturo surbaze de la moralo de Azio kaj la scienco de Eŭropo. Se religio kaj scienco, kunagados kiel spirito kun korpo, ambaŭ povos kontribui nur por la feliĉo de la homaro, kaj la Ĉielregno sur la tero neniel estos utopio.

El "Cent Vizaĝoj de Kansai Distrikto"

Foteksponicio okazigita en Osaka, Tokio kaj Hakata



Sinjorino Nachi Deguchi,
la gvidantino de l' Oomoto-Movado
Foto de Toiĉi Nagata

Mia Idea Disvolvigo por la Vegetarismo

Estis en la kulmina stadio de la Pacifika Milito, kiam mi studis la farmacion, kaj dum mi ankoraŭ estis universitata studento, la milito venis al la fino. La milito, kiu igis min ankaŭ travivi la tragikajn okazintaĵojn, impresis min profunde kaj traboris mian koron per la graveco de la respekto al la vivo. Siatempo mi ne komprenis bone la verajn kaŭzojn de tia granda viktimitigo de homaj vivoj. Sed apenaŭ la milito finiĝis, mi faris rezolucion, ke mi — kiu jam decidis dediĉi min al io, kio utilis al la bonfarto de la homaro, eĉ se ĝi enfermus min en posteno de socia subtavolo — apartigi min, antaŭ ĉio, disde ĉiaspeca mortigo: mi malpermesis al mi viandmanĝadon, ĉar mi kredis, ke ĝi kontraŭas la principon de la respekto de la vivo. En mia nova vivprincipo mi estis tiom konvinkita, ke ĉiuj bonvolaj malpersvadoj de miaj profesoroj kaj amikoj estis vanaj. Kompreneble, mi devis prikonsideri ankaŭ la sekvojn de mia decido rilate al miaj familianoj. Sed ĉiam en mi supervenkis la ideo, nome, ke se oni deziras aboli militon el la homara vivo, oni forĵuru ĉian mortigon unue el sia medio: la plej proksima ĉirkaŭaĵo, en kiu oni vivas. Kaj mi ekagis!

En la fino de 1945 — la jaro, en

kiu la manko de nutraĵoj estis sentata ĉiam ankoraŭ pli akre, mi decidis neuzi eĉ la sekigitajn fiŝetojn por nia supa ŝtofo. Senbezzone diri, ke la senvianda dieto el lakto, laktaĵoj kaj ovoĵoj estas bonega por nutrado, sed ĝi estis tro granda lukso por disponi en tiu tempo. Tiam, mi demandis min, kio estas tia manko de nutraĵoj. Ĉu ĝi estas la absoluta manko de nutraĵoj? Ne! ĉar mi vidis antaŭ miaj okuloj multajn usonajn oficirojn kaj soldatojn, kiuj estas ne nur dece vestitaj, sed grase nutritaj. Do, kio kaŭzis al ni aparte la mankon de la nutraĵoj? Tio estas nenio alia, ol la milito, kiun ni travivis. Milito venas, mi rezonis, de nia vivkoncepto, laŭ kiu ni akceptas la mortigon kiel konvencian rimedon por nia vivtenado. Se jes, mi konkludis, la ĉesigo de viandmanĝado (kiu entenas la mortigon de brutoj) devas esti la antaŭkondiĉo por nuligi la kaŭzon de milito kaj de la manko de nutraĵoj. Tio eble estis iom transsalta konkludo de junulo. Sed al mi ŝajnis, ke Usono, Sovetio kaj ĉiu alia armita nacio eraras sekvante la vojon kiu kondukas nur al milito, ĉar — mi opiniis — tiel longe, dum la homoj daŭrigas la buĉadon de bestoj interne de la lando, neniam ĉesos milito ekstere. Mi esprimis mian opinion al miaj gepatroj. La

patro nenion respondis: li mal-admiris nur montrante al mi la esprimon de ia kompato. Kredeble li trovis en mi ion, kio estus karakteriza ĉe knabo “postrestinta” en la intelekta evoluo. “Ne tro ekstremigu vin en kiu ajn afero”, — diris la patrino.

De mia knabeco, la ekvido de sangmakuleto tremigis min tra la korpo. Proksime de mia loĝdomo troviĝis kokaĵ-vendejo. Por iri ĉiutage al la lernejo mi devis pasi antaŭ la butikoj. Tie, sur la pavimita vojo mi de tempo al tempo trafis dehakitajn kapojn de kokoj kun sangmakuleto. Iliaj duonfermitaj glimaj okuloj pikis mian koron pro neesprimebla sento de kruelo. Alia rememoro el miaj knabaj tagoj rilatas al la sortimentado de insektoj, kiun mi devis fari dum somera libertempo. Kiom terura estis la tasko de tiu scienca leciono!

Sed la milito, kiu baldaŭ venis, ne indulgis al mi tian sentimentalismen. Ĝi envolvis min kaj ĉiujn aliajn — ankaŭ knabojn kaj junulojn. Multaj, eĉ pli junaj ol mi, iris aŭ “en la aeron” aŭ “sur la maron”. Pluraj ja revenis vivantaj al nia ĉirkaŭaĵo: tiu tajloro perdinte la vidkapablon, tiu muzikisto sen dekstra brako, tiu inteligenta junulo nun kiel blindulo kaj amputita je la kvar membroj...

Ne nur la viroj. Ne nur el la batalfrontoj. Sed ankaŭ la virinoj kaj infanoj el la hejmaj vicoj de uzinoj kaj fabrikoj: multaj estis

brulvunditaj per fiambomboj, ho, kiel rostitaj fiŝoj aŭ duonbruligitaj ŝtupoj! Kiel studento mi estis mobilizita kaj per ŝargaŭto transportadis ilin de uzinoj al hospitaloj. Mi memoras ilian amasagonion kaj -kriegon, kiun je ĉiu eta skuigo mi aŭdis en la konduksido. Okulŝirmitaj kontraŭ la aktualaj militfazo, mi kiel ĉiu alia sciis nenion pri la situacio. “Ĉu venko aŭ malvenko”, mi skribis en iu paĝo de mia taglibro, “egale, la milito venu tuj al la fino. Nun. Nun. Nun. Ni devas ekstermi militon por eterne!”

Finfine la milito finiĝis. En la tagoj, semajnoj kaj monatoj tuj sekvintaj la militfinon mi ankoraŭ ne havis la okazon ekscii la verajn kaŭzojn de la ĵus finiĝinta infero. Sed sub la premo de la kruelaĵoj, kiujn mi mem vidis, mi devis trovi vojon — rimedon por neniam plu iri en inferon sed ĉiam iri la vojon al paco. Jen sub tiaj cirkonstancoj okazis, kiel mi jam skribis, ke mi decidis forigi ĉian mortigon el mia vivo: forigi la viandmanĝadon el mia ĉiutaga vivo. Tio estis almenaŭ mia unika maniero de solvo por mia celo.

Kun la paso de la jaroj, kun la kuraciĝo aŭ resaniĝado de la militvundoj spirita kaj materialaj, individuaj kaj sociaj, ĉio fariĝis pli kaj pli klara al mi rilate la socian strukturon kaj ĝiajn sistemojn, kiuj sub ŝtata suvereneco kaj en internaciaj politikaj rilatoj povas facile kaŭzi la eksplodon de milito. En 1949 mi estis tiom kreskinta, ke mi ne plu povis esti

indiferenta al politikoj — naciaj, internaciaj kaj tutmondaj. Mi trairis grandan metamorfozon de mia mensa vivo. Tamen, ĉiam restis sama mia konvinkigo pri la vegetarismo, ke ĝi estas ĝusta, se ne tuja, vojo al la mondopaco.

Revenante al mia vegetarana dieto, ĝi komence estis, kiel mi jam skribis, sen lakto, laktaĵoj kaj ovoj, kaj konsistis el nepolurita (branhava) rizo, legomoj, salo kaj vegetaĵa oleo. Se tiu dieto estis ne tute kontentiga al mi el dietetika vidpunkto, tio ne signifas, ke ĝi estis ia kompromiso en la tempoj de malhavo, nek ke mia konscienco diktis ĝin al mi recepti, riskante aŭ timante iel malbonfari al mia propra sano. Nenio kuŝis en mia subjektivo, kio igis min suferi aŭ oferi en ia ajn senco — pro mia dieto, tial, ĉar, eĉ sen la servianda dieto el lakto, laktaĵoj kaj ovoj (kiel en la okazo de la okcidenta vegetarismo, ĝenerale), kiuj havas tre altan nutrovaloron de la animala proteino, mi tamen estis jam incita en la dieto, kiu dependas ekskluzive de la nepolurita rizo, legomoj, salo kaj vegetaĵa oleo — iniciatita de d-ro Kenzo Niki, emerita profesoro de Medicina Fakultato de Tokia Universitato kaj ankaŭ de s-ro Nyoiti Sakurazawa, prezidanto de Franca Instituto por la Studo de Orienta Medicino.

Iutage — en la unuaj tagoj de mia vegetaraniĝo, mi ricevis paperslipon el la mano de d-ro Mitosi Tokuda, aŭtoritatulo pri la evoluci-

ismo en la Scienca Fakultato de Kiota Universitato. En ĝi mi legis lian opinion — esprimitan rilate la teorian flankon de mia vegetarismo:

“Vivi kiel io en la natura (sovaĝa) regno kaj vivi kiel socia estaĵo estas du tute malsamaj aferoj. Ĉiu animalo evoluadis havante por si certan nutrorilaton kun aliaj animaloj aŭ vegetaĵoj. Tiurilate, ankaŭ la homo ne estas escepto. Sed la brutoj, cerealoj kaj legomoj estas bredataj aŭ kultivataj per la manoj de homoj por uzo de ties nutrado. Tio signifas, ke ili ĉiuj ne plu ekzistas en la natura regno. La brutoj ne ekzistus sen la certaj kondiĉoj, kiujn la homoj provizas al ilia vivtenado. Senbezono diri, ke ni devas dece pritrakti ilian vivon. Sed se temas pri la respekto de la vivo en la universala senco de la vorto, tiam ne sufiĉas akcenti ĝin rilate nur al la brutoj, sed rigardu ankaŭ la vivon de ĉiuj estaĵoj en la naturo kaj ties vivlukton. La homoj klopodis kaj klopodas ekstermi nur la rekte al si malutilajn el ĉiuj naturaj bestoj, birdoj kaj insektoj, kaj tio estas unu aspekto de la homa lukto, per kiu la homoj strebis havigi al si ĉiam pli bonan vivon. Tiu ĉi noto ne celas kontraŭstari vian vegetarismon, sed nur sugesti kelkajn punktojn, kiujn oni bezonus pripensi antaŭ ol fari ian konkludon”.

La vortoj, “la brutoj ne plu ekzistas en la natura regno” impresis min — fulmobate! Ĉi tie, mi permesas al mi, citi ankoraŭ la vortojn de d-ro Rajendra Prasad, kiuj estas tre

instruaj en tiu ĉi koncerno:

“La tuta koncepto de iu individuo rivelas al ni la rilaton, kiu ekzistas inter la nutraĵo de tiu individuo kaj ties konduto al aliaj, kaj per racia rezonado — kiu neniel estu fantazia — ni ne povas ne alveni al la konkludo, ke la sola rimedo likvidi la hidrogenan bombon estas likvidi tiun mensostaton, kiu produktis ĝin, kaj la sola maniero likvidi tiun mensostaton kuŝas en la respekto por la tuta vivo, vivo en ĉiuj formoj kaj sub ĉiuj kondiĉoj. Tio resumiĝas en unu vorto: vegetarismo.

“Estas sen dubo, ke la senperfortismo aŭ la principo vivi kaj lasi aliajn vivi estas la sola, kiu povus solvi la plejgrandan parton de la malfacilaj problemoj de la homaro. En la aktiva formo, ĝi signifas, ke oni estu preta oferi sian memon, sian komforton kaj siajn ambiciojn por la bono de la aliaj. La alternativo estus: oni utiligu la aliajn por plenumi siajn dezirojn kaj ambiciojn.

“Iel kaj aliel, la homo dum jarcentoj konvinkadis sin, ke li estas la plej bona kaj la plej evoluinta el ĉiuj kreitaĵoj kaj tial, nur rajte decas, ke ĉiuj aliaj kreitaĵoj estu subigataj por servi kaj kontentigi lin. Estas dank’ al tiu ĉi koncepto aŭ teorio, ke ni lasas nin buĉi aliajn animalojn aŭ por satigi nian palaton, aŭ por plenigi nian stomakon, aŭ por dekoracii nian korpon, aŭ por amuzi nin kiel en sportoj.

“Se jam la homo, estante pli

supera ol ĉiu alia animalo, rajtus ekspluati aŭ eĉ buĉi ĝin por sia propra utilo, lia dua natura paŝo estus, ke al la pli forta homo aŭ nacio decas konsideri tion neniel malbona: ekspluati aŭ pereigi la malpli fortan homon aŭ nacion. Jen kio okazadis, substrekante la tutan ekspluatadon al la popolo de unu nacio fare de la popolo de la alia — pro neniu alia kaŭzo ol ke tio estas necesa por ke la vivnivelo de la dua popolo estu altigata je la risko de la unua”*) .

El ĉio, kion d-ro Prasad skribas, estas klare, ke — kvankam li bazas sian tezon sur la respekto de la vivo en la universala senco de la vorto — la koncepto: Dio kreis bestojn por la homo, estas nur dogma! Sed nur fornei tiun dogmon ne sufiĉas por la vegetaranoj. Ili bezonas kompreni ankoraŭ tiun fakton, ke por riĉigi sian vivon la homo en iu stadio de sia evoluo komencis bredi sovaĝajn bestojn, kaj do, ĉi tiuj bestoj estas, por tiel diri, artefarita raso, kiu ne plu apartenas al la natura mondo, sed vivtenas sin depende de la mano de la homoj.

Tiel simplan veron mi mem ne rimarkis por longa tempo. En la lernejaĵ klasĉambroj oni instruis al ni la diferencon inter homoj kaj bestoj pli multe el morala vidpunkto ol el la biologa; oni instruis al ni la teruran vivlukton de la sovaĝaj estaĵoj unuj kun la aliaj, kiel ekzemple laŭ la leĝo de Elton aŭ de

*) El “The voice of Ahinsa” (La Voĉo de Ahinsa), Dec., 1957

Nicolson, sed neniam la diferencon inter la evoluo de la sovaĝaj bestoj kaj tiu de la homoj kiel sociaj estaĵoj. Sekve, por la idea bazo de mia vegetarismo, mi simple dividis la kreitaĵaron en du kategoriojn: la vivantaj estaĵoj havantaj la konscion, kaj la aliaj ne havantaj la konscion. Kaj al tiu ĉi dua grupo estis por mi tiel facile apliki la vortojn, ekzemple de Par Paul Chauchard*):

“La plejparto de la procesoj, kiujn ni ĵus pritraktis, estas identa kiel ĉe la homo kaj plej evoluintaj el ĉiuj animaloj, precipe mamuloj... Kvankam ni ne povas vere taksii ilian konscion kaj volon, escepte pere de nia persona vivsperto, tiu analogio de reago [sin-retiriĝo kontraŭ vivminaco, ktp. — Noto] pledas favore por la ekzistado de konscio kaj volo en tiuj animaloj... Tial, — skribas L. Lapicque, — ĉar ni vidas de-ekstere la sinteniĝon de vertebrulo, similan al tiu de la homo, ni bezonus esti sklavoj de rigida metafizika dogmismo por malakcepti, ke tiu sinteniĝo, vidate de-interne, entenas la analogian psikan fenomenon [kiel ĉe la homo — Noto].”

Jen, kia bela konkludo de la idea bazo por mia vegetarismo! Siatempe, mi jam opiniis, ke mia teorio estas perfekta — tiom pli, ke ĝi jam estas ankaŭ praktika kun mia dieto supre

dirita. Sed ĝi entenis idean difekton. Mi bezonis sufiĉe longan tempon antaŭ ol rimarki la gravan diferencon, kiu ekzistas inter la vivmanieroj de la homoj, de la brutoj kaj de la sovaĝaj bestoj!

Jam estas sciata, ke preskaŭ ĉiuj grandaj pensuloj en la homa historio malkonsilis la mortigon de la bestoj kaj precipe de la brutoj. Kredeble iam venos la tempo, kiam la buĉado de brutoj fariĝos tute malkongrua kun la homa sento kaj la instalado de buĉejoj abomeninda kaj netolerebla en la homa socio; kiam la nombro de hejmaj bestoj kaj birdoj estos minimuma kaj ekskluziva por la produktado de lakto kaj ovoj. La malmultiĝo de tiaj bestoj kaj birdoj kaŭzota de la senvianda manĝokutimo de homoj neniel kontraŭas la principon de la respekto de la vivo, sed estos konforma al la celo de ĉiuj vegetaranoj tial, ĉar tio signifas, ke ili kiel viandbestoj kaj -birdoj nur malekzistos, ĝuste same kiel ili malekzistis en la komenco.

Fine, pri la sovaĝaj bestoj kaj birdoj vivantaj kaj interluktantaj en la natura regno ni facile vidas, ke ilia afero estas tute alia, ol la problemo de la buĉado per la mano de homoj. Ĝi estas tute ekster la kadro de nia temo.

Esp-igo: T. Nakamura

* El Fiziologio de Konscio

Faldfolio: “Oomoto kaj U. H. A.” senpage liveras Oomoto

João Camillo de Oliveira Tôrres

La Teorio pri Transrealismo

La eltrovaĵoj de la moderna fiziko, la esploroj de la profunda psikologio, certaj literaturaj analizoj, ĉio venas kontribui por formi novan vizion pri la mondo. Tion oni povus nomi “transrealismo”. La aŭtenta estaĵo troviĝas trans la ŝajnaj formoj kaj la klara konscio, tiel ke ni vivas en profundaj dimensioj en kiuj vere kuŝas la efektivaj kazoj de la ekzistado. La klasika nocio pri materialismo, ekzemple, fariĝis ĉiel senseca, ĉar la sentebla materio estas fakte nenio materia kaj ja spaca projekcio de energio. La homa korpo ne kontraŭas la spiriton, sed estas ĝia plilongigo. Ni pensas per la tuta korpo kaj nesondebla mondo de realaĵoj ekzistas, trans la korpo.

La pluraj teknikoj de esploro kaj la analizo eltrovitaj en nia tempo venis meti sur tute novan planon la tradician noción pri realeco, inversigante la tavolojn de la estaĵo, igante netralumebla tion, kion oni konsideris travidebla kaj lumtrairebla tion, kio ŝajnis dura kaj kohera.

Tiu nocio pri transrealismo estis vekita en mi dum la analizo de la literatura verkaro de Cornélio Pena kaj de ĉi ties revolucia maniero verki fikcie. Tiu verkisto, antaŭ ne longe malaperinta, adoptis originalan sistemon de estetika kreado. Li serĉadis proprajn nomojn de vere ekzistantaj personoj kaj aplikadis ilin al tipoj prenitaj el la realo, prefere sen pliaj ligoj al la nomita persono. Kontraŭe al la tradicia procezo adoptita de la plimulto de la verkistoj, kiuj kreas la personojn transkopiitaj sur reala tipo kaj elpensas nomon, la aŭtoro de “Limbaro” (Fronteira) elektas nomojn de konataj

personoj kaj aplikas ilin al realaj aŭ fikciaj estaĵoj. La efekto por tiu kiu konas la medion, en kiu ĉirkaŭiras la estaĵoj, naskitaj el la plumo de S-ro Cornélio Pena, estas vere stranga, ĉar de la asocio de la persono al la nomo, oni pasas al la asocio de la homo al la persono, kiu fakte inspiris la literaturan tipon. Ili estas du supermetitaj bildoj kreante veran halucion. Tiel, kiam en “Ripozo” (Repouso) aperas iu certa Urbano, la ĉefheroo, ni rememoras personon, kiu vere posedis tiun nomon, sed ankaŭ alian, kiu liveris la konturojn de sia personeco al la romanverkisto. Kaj ni falas en plena sveno.

Kiel kompreni, ĝenerale, tiun pozicion, kiun ni nomas “transrealismo”?

La homa ekzistado konsistas el situacioj, kiuj sin sekvas en la tempo kaj en la spaco. Cetere, ili postsekvas kaj precipe volvas, rekovras unu la alian. Io simila al la falbaloj, kiuj multobliĝas. Se iu sin donos al la peno analizi sian konkretan nunan situacion kaj klopodos vidi la situaciojn, kiuj formas tiun en kiu li troviĝas, li konstatos, ke de unu situacio al alia, li iros al la infinito. Ĉiuj situacioj, kiujn ni jam trapasis aŭ kiuj enkorpiĝas en ni, kreas en ni duan naturon, kiu rekovras la unuan. Kaj kio estas tiu unua naturo? demandas Pascal. Ĉu ĝi jam ne estas iu unua kutimo? La antikva psikologio, tiel simplisma, ĉion solvis per la priskribo de la aktiveco de la nerva sistemo, per la abstrakta kaj sistema studo de nervoj kaj fibroj, de cerbaj loboj kaj neŭromoj, sed la homo estos totala mistero se ni priserĉos en li la akso-cilindrojn kaj la

cerbajn ĉirkaŭvolvojn. Li estas nevidebla produktaĵo de sukcesigo de situacioj, kiuj sinsekve interkovriĝas ĝis igi lin — pardonon por la hejmeca komparo — specon de cepo. Mi konfesas, ke la komparo estas tro vulgara kaj eĉ sen iu ajn dozo de literatura koloro. Tamen ĝi utilas. Ne ĉiam oni povas paroli pri najtingaloj je lunlumo aŭ pri arapongoj je mateniĝo. Ni restu kun la cepo. Se ni elfoliigos ĝin, ni iras ĝis la fino kaj ni ne trovos la kernon — ni nur elfoliigos.

Antaŭ ni staras homo. Li estas profesoro, kiu donos lecionon aŭ kliento antaŭ kuracisto, dum la kunsido por psikanalizo. Sed ĝis atingi tiun punkton, kiom da vivoj li ne vivis, kiom da lokoj li ne vidis, kiom da diferencaj realaĵoj ne kruciĝis antaŭ li... Tiu profesoro, krom profesoro estas familia patro, apartenas al partio, pledas por futbala klubo, obeas religion, havas iun ajn hobion, adoptas difinitajn literaturajn preferojn kaj tiel ĝis la infinito. Li estis infano, adoleskanto, studis en pluraj kolegioj, servis en armeo, amindumis kaj edziĝis. Kaj tie, jen li demonstrante tedan kaj sekan geometrian teoremon. Se ni tamen enprofundiĝos, serĉante tion, kio troviĝas malantaŭ la esprimoj, kiujn la malnova Eŭklido jam estis uzinta, ni havos mondojn de bolantaj aferoj. Kaj la psikanalizisto dirus, ke tiu homo studis geometrion pro sekureca neceso, deveninta el emocia ŝoko, kaŭzata de la naskiĝo. Kaj povus esti, ke prave: li sin aliroĉas al la paraleloj, sin apogas sur la trianguloj, maltrankviliĝas pri la nemezurebleco de cirkumferenco pro la angoro, kiun alportis al li la subita elĵeto el la varmeta patrina medio.

Tamen, ĉu la homo estas sole tiu sveniga interkovriĝo de travivitaj situacioj, de tiuj “travivitaj kaj pasintaj tagoj”, kiuj markas la individuon ĝis la

lasta punkto? Vere estas substanca kerno, viva centro, io kio restas kaj daŭras. Ni persone sentas — kiel ajn plej strangaj estas la vojoj, kiujn la ekzistado trairigas nin — ke ni estas certa infano, kiu iutage komencis ekpaŝi. Kial, ĝenerale, ŝajnas al ni stranga la sono de nia registrita voĉo aŭ kial ni sentas nin trompitaĵ, kiam io montras al ni nian pliaĝecon, krom la fakto, ke tiam nia “ekstera animo”, tio estas, tio, kion la aliaj pensas, ke estas nia spirita substanco, fariĝas klara kaj evidenta kaj tiam ni komencas esti vidataj, kiel la aliaj nin vidas kaj ne kiel ni vidas nin?

Kiel la aliaj trompiĝas pri ni, ni ankaŭ trompiĝas. Ni absolute ne estas kion ni imagas. Sed ni scias, ke estas esenca diferenco inter kio ni ŝajnas esti antaŭ niaj okuloj aŭ la okuloj de la aliaj kaj kio ni efektive estas.

Tial, revenante al Cornélio Pena, estas “danĝere koni la aferojn anstataŭ vidi ilin”, kiel oni legas en unu el liaj romanoj. Kaj jam Guimarães Rosa, alia majstro de transrealismo alivestita kiel regionalisma romanverkisto diradis, ke “vivi estas tre danĝere.” La vivo estas danĝero kaj ĉi tiu konsistas el la eltrovo de situacioj, kiuj rivelas al ni la propran vivon en ĝia profunda intimeco. En “Grandes Sertões — Yeredas” — la mistero rondiras la ekzistadon: ĉio estis ŝajnigo. Estis substanca trompiĝo, kiu nur reveliĝis tro malfrue, kiam finfine, nenio havis praktikan gravecon. Tiu revelacio vidigis la belecon de sento, kiu unuavide ŝajnis trompiĝo. Ĉio estis trompiĝo: nur la morto rivelis la veron. Ne nur pro la danĝero de apostazio la Romeklezio ne kanonizas la vivantojn, nek pro la fakto, ke la kanonizo signifas rekonon, ke la individuo jam atingis la Gloron. Ekzistas pli profunda kialo: nur la morto rivelas la personon. Vere, ni nur povas ĝui vizon

pri la esenca realeco de homo post kiam li mortas. Vivanta ni povas imagi lin grasa kaj kalva: neniam, kiel homon, kies vivo posedas definitivan signifon. La kunvivado mem, konfirmata de la amo, estas sinsekvo de trompiĝoj kaj konfuzoj. Nur kelkfoje en privilegiaj momentoj ni sentas nin perfekte identigitaj kun tiuj, kiuj estas pli proksimaj al ni kaj de kiuj ni estas komprenataj.

Sed tiu transrealismo ne kondukas al la neado de la homo. Kontraŭe — nur ĝi ebligas la konon de la homa estaĵo. Ni nur povas akiri la konon pri la homa naturo (en la kampo de la historio, de la sociologio, de la psikologio, ktp.) se ni startos el la principo, ke la homa vivo estas interkovriĝo de situacioj kaj ke trans la konkretaj situacioj troviĝas mistera realo, preskaŭ ne alirebla, kiu estas la lasta radiko de la naturo kaj de la estaĵo. Ĝi estas la eltrovo de la estaĵo pere de la “esti” kaj de la “havi”.

Fakte la filozofio necesas konscii pri la verboj “havi” kaj “esti”. Se la klasika metafiziko turniĝis ĉirkaŭ la “estaĵo”, la metafiziko de la konkreta ekzistado, kiu ne estu simpla pozitivismo de ombroj kaj abstraktaĵoj, simpla ekzistencialismo de estantaj kaj supraĵaj situacioj — devas ekiri de la konkreta estaĵo, tio estas, de la “esti” kaj de kio formas la “estaĵon”, de kio ĝi posedas de “havi” por transen, multe pli transen renkonti la “estaĵon”, kiu kaŝite sin ŝirmas en la faldadoj de la estantaj situacioj, fatale pasemaj kaj fuĝaj, sed efektive konkretaj en nia ekzistado. Anstataŭ konsideri la homon en si mem, ni konsideru tiun konkretan homon kaj pere de li la substancon kaj definitivan realon. Ĉi tiu realo, nuna kaj ĉitiera, la singularo difinita de tio, kion Duns Scot nomis ‘haecceco’.

El “Tribuna da Imprensa”,
Rio, 16/17-majo, 59

Elportugaligis J. M. da Silva

NOTOJ

Cornélio Pena: (pr. pron.: Korneljo Pena) estas jam mortinta brazila romanverkisto, kies kompleta verkaro eldoniĝis en 1959.

arapongo: estas nomo de birdo (*Chasmarhyncus nudicollis*) ankaŭ konata kiel “ferajisto”, fama pro la metala sono de la kanto.

Guimarães Rosa: (pr. pron.: Gimaraens Roza) estas unu el la plej elstaraj nuntempaj brazilaj verkistoj. Revolucia stilo (uzas regionalismajn vortprovizon, parolmanieron, originalan strukturon, ktp.). Diplomato. Kiam juna li studis Esperanton.

João Camillo de Oliveira Tôrres: (Johano Kamilo de Olivejra Tohes) estas universitata profesoro, historiisto, filozofo, eseisto, ktp. Gravan premion gajnis, antaŭ ne longe, lia ampleksa verko “La Kronita Demokratio” — pri la reĝa reĝimo iam reganta en Brazilo. La supra traduko estis al li prezentita kaj iomete reformita laŭ interkonsento. Eĉ tiel, la traduko de la lasta paragrafo restas iom neklara, ĉar la ludvorto ne koincidas en la portugala (same, kiel en la hispana kaj la itala, laŭ la aŭtoro!) kaj en Esperanto.

— *esti* = port.: *ser*, *estar* = franca: *être*, *avoir*

— *esti* kaj *estaĵo* = port.: *ser* (verbo kaj substantivo)

— *esti* bona = *ser* bom

— la homa *estaĵo* = o *ser* humano

Se fumas io, oni serĉas la kaŭzon

Kial oni ne prezentis la filmon dum U. K. ?

Estu notite, ke dum la 44-a Kongreso en Varsovio la Esperanta filmo "Sub la Ombro de Hiroŝima" ne povis esti prezentita malgraŭ la multaj klopodoj de membroj de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj malgraŭ la "aprobo" de la Pola Prezidanto kaj la "promeso" de Kongresaj funkciuloj ĝin prezenti en la kadro de la Kongreso. Tion ni kaj niaj legantoj eksciis el la publika letero de Londona samideano F. Paraige, publikigita en nia antaŭa numero. Dum ni ankoraŭ ne scias, pro kio devis okazi tia malplenumo de la promeso, ni ricevis de nia s-ano Ĉunoŝin Jui en Nagoja kopion de letero (dat. 18 dec. 1959) adresita al li de s-ro Karl Kvist, sveda s-ano kaj helpsekretario de MEM, kiu partoprenis la Kongreson kaj klopodis kun aliaj por la prezentigo de la nomita filmo. Lian leteron ni publikigas ĉi-sube.

Kompreneble, ni ne emas kredi, ke UEA aŭ LKK manovris forŝovi la filmon; sed se la filmo finfine ne estis prezentita kiel promesite kaj tio kaŭzis plendojn en formo de 'protesto' de tiuj, kiuj multe — tamen vane klopodis por la sukcesigo de l' afero, ni esperas, ke oni faros almenaŭ klarigojn publike pri la vera kaŭzo aŭ la cirkonstancoj, sub kiuj la filmo ne povis esti prezentita. Red.

Letero de s-ro Karl Kvist adresita al s-ro Jui Ĉunoŝin

Kara kamarado,

(Komencu parton ellasita. Noto de red.)

Pri via dua demando mi povas respondi, ke mi ricevis leteron de k-ino Paraige en kiu ŝi rakontis ke ŝi admonis vin protesti ĉe UEA pro la stranga kondutmaniero rilate montradon de la filmo "Sub la Ombro de Hiroŝima".

Jes, ĉar estis mi kiu prenis la filmon de la flughaveno Varsovio, portis ĝin al la Kongreso kaj tie intertraktis kun LKK, la sinjoroj Fighiera kaj Rajski, pri rajto prezenti ĝin antaŭ la 44-a Kongreso, mi povas konfirmi jenon:

S-ro Rajski promesis en nomo de LKK ke ni rajtas prezenti la filmon kaj oni fiksas daton kaj horon por la prezentado. La publiko venis al la salono kaj tiam LKK-ano simple menciis ke ne eblas montri ĝin ĉar mankis al LKK projekciilo por mallarĝfilmo. La publiko devis foriri sen vidi la anoncitan filmon. Ni forte protestis. Duan fojon mi kaj du aliaj MEM-anoj vizitis la LKK-oficejon kaj parolis kun s-ro Rajski kaj alia funkciulo. Tiam ĉeestis ankaŭ japana kamarado. Parenteze mi povas diri ke ni pli ol horon devis atendi ĝis tiu persono venis kiu decidis pri la film-aferoj. Oni donis novan promeson, nome ke oni montru la filmon dum la ferma soleno. Ni akceptis tiun ĉi proponon konsiderante ke tiu tago kaj tempo estus konvena. Oni ankaŭ promesis ke LKK respondecu por la propagando por tiu ĉi prezentado. Bedaŭrinde mi devis veturi hejmen pli frue ol okazis la solena

fermo de la Kongreso, sed mi scias ke oni ankaŭ fuŝis la aferon kaj sekve la filmo ne estis montrita. Vera skandalo!

Kompreneble estas ne facile pruvi ke temis pri sabotado, sed mi ne dubas ke estis io simila. Kiam mi lastfoje intertraktis kun LKK, oni diris ke ili havigis projekciilon por mallarĝfilmo.

La vero estas ke la aŭtoritatoj de UEA, i. a. s-ro Fighiera je kelkaj okazoj esprimis sian timon ĉar kelkaj delegitoj tro multe parolas pri la pacafero; al k-do Schobl en GDR li rekte diris tion. Oni ankaŭ kondutis strange kiam temis pri rajto por la vietnama delegito saluti de sia lando, ktp. UEA grimpas ĉiam malantaŭ la ŝildo "neŭtralismo". Estos do nur bone se vi protestos ĉe ili.

(Ferma parto ellasita. Noto de red.)

Japanaj Vizagoj

(22) Imperiestrino Ĵingu

Kiel virecaj mieno kaj trajtoj de virino! Sed ne mirinde, se oni aŭdas, ke tiu ĉi statuo reprezentas Imperiestrinojn Ĵingu, kiu en la fino de la 4-a jarcento (p. K.) ekspediciis en vira kostumo trans la maron por konkeri Koreon — unu el la antikvaj regnoj en la nuntempa Korea duoninsulo. Ĝi estis farita kiel ŝinto-idolo en la fino de la 9-a jarcento, kiam oni apoteozis ŝin kune kun ŝia filo, Imperiestro Ooĵin kaj unu alia kiel gardospiritojn en la Jakuŝiji Templo, Nara. Proksimume de tiu tempo la ŝinto-statuoj komencis skulptiĝi laŭ la modo de buda-idoloj. Ĝenerale, la ŝinto-statuoj komence havis la fortan kaj dignoplenan esprimon, kian oni vidas en tiu ĉi bildo. Tio devenas ankaŭ de la fakto, ke la japana skulptarto ekde la 9-a j. c. prosperiĝis per uzo de ligno-materialo kaj oni skulptis el ligna bloko kun ĉizoj profundaj kaj akraj, tiel ke la artaĵo donas ĉiam potencon impreson. Ne povus esti, ke ĉiu virino en tiu tempo estis tiel vireca kiel ĉi tiu bravulino, sed kredeble estas la karakterizo de la epoko, kiu influis la skulptiston trovi la motivon de sia artverko en la figuro de la Imperiestrino. Ŝiaj hararanĝoj kaj kostumo, oni konsideras, reprezentas tiujn de la korteganinoj de la 9-a j. c.

Tan Tazaŭa, ĉefo de Nara Kultur-Trezora Instituto
Trad. P. M.

*) Kolorigita lignostatuo konservata ĉe Jakuŝiji Templo, Nara





El Fotalbumo de Pilgrimanto Itoo (3)

① 25-26 nov. 1959 en Leicester, Anglujo. S-ro Itoo gastigis ĉe la hejmo de ges-roj Smith kaj fotografis la gesamideanojn, kiuj bonvenigis lin. Leicester estis la unua stadio de la pli ol unu monanton daŭranta "pilgrimado" de s-ro Itoo en Britujo.

② 27-29 nov. en Hexham. Nia reprezentanto vizitis la knabinan lernejon, kies vicprezidanto estas nia poetino f-ino Marjorie Boulton. Ĉe ŝia hejmo, kie li gastigis, ankaŭ *Montevideo*, la siama kato (tiel-nomita memore al la historia Unesko-rezolucio pri Esperanto), bonvenigis s-ron Itoo kaj estis fotografita kune kun f-ino Boulton.

③ 28 nov. en Newcastle. Dum sia restado en Hexham, s-ro Itoo vizitis tiun urbon por ĉeesti por li aranĝitan esp-istan kunvenon ĉe s-ino Curran. S-ino Ballantyne, kiu ĉeestis, lerte gajigis la kunvenon kaj alnomis s-ron Itoo "lupo". En sia raporto s-ro Itoo notas: "lupo" signifas viron, kiu estas ne sendanĝera el virina vidpunkto. Oni tamen venis al la feliĉa konkludo, ke ne sole Itoo, sed ĉiu viro kaj ĉiu virino havas iom da lupeco kaj la mondo estas gaja!

④ 5-7 dec. en Bristol. S-ro Itoo fotografis la amikan rondon, kiu bonvenigis lin ĉe la hejmo de ge-sroj Reto Rossetti kie li gastigis. S-ro Rossetti sidas dekstre kaj s-ino Rossetti sidas maldekstre. Ŝajnas ke dum horoj de enlitiĝo, s-roj Rossetti kaj Itoo — ambaŭ laŭ la japana "krur-plekta" maniero sidante sur la litoj — prosperigis la konversacion pri diversaj temoj: interalie, la "kapkusena" epiteto en la japana klasika poezio. Dum en Bristol, s-ro Itoo vizitis la urbon akompanate de afablaj gesamideanoj, ĉeestis la tiean esp-istan kunsidon, faris paroladon antaŭ 70-80 studentoj ĉe la "Internacia Studenta Klubo" de Bristol-Universitato, partoprenis la grandan Zamenhaf-feston ĉe *Hotel Royal*, ktp.

⑤ 8-11 dec. en Londono. La 11-an, s-ro Itoo faris paroladon antaŭ ĉ. cent gesamideanoj de Londona Esp-Klubo. La foto montras parton de la ĉeestantaro.

⑥ 12 dec. en Bournemouth. Partoprenis la tiean esp-istan kunsidon, kiu okazis en kvakera kunsidejo. La ĉeestantaro ĝuis la japanajn lumbildojn kaj paroladon de s-ro Itoo. Tiu rimarkis la kuproŝildon ĉe la pordo de la enirejo, kiu diris (proksimume): Malarmado estas ĉies devo.

⑦ Nia afabla kunlaborantino s-ino Doris M. Worcester en sia Londona hejmo, kiu samtempe estis ĉefstabejo por la vojaĝo de s-ro Itoo en Britujo.

⑧ 25 dec. Londono. La Kristnaska festo ĉe la hejmo de

s-ino Worcester, kun du nov-zelandanoj, kiujn ŝi invitis, kaj s-ro Itoo. La foto montras de maldekstre: s-ro W. Hudson King, s-ino Worcester, s-ro Itoo kaj s-ro Draver. Oni vidas sur la fono la standardojn de Oomoto kaj UHA kaj kelkajn japananojn.

⑨ 6 jan. 1960 en Bonn, Germanujo, kie komenciĝis la dua parto de la mondvojaĝo de d-ro Itoo. Li estis fotografita antaŭ la Memordomo de Beethoven, kiun li vizitis akompanate de s-ro E. Kind.

⑩ 10 jan. en Reutlingen, Germanujo. S-ro Itoo intervidiĝis kun nia respektata malnova amiko d-ro K. O. Schmidt, gvidanto de *Die Weisse Falne* (La Blanka Standardo, aŭ la novspirita movado) kaj kune vizitis la tombon de d-ro Viktor Schweitzer, la fondinto de la nomita movado. La foto montras de maldekstre: s-ro Itoo, filino de d-ro Schweitzer kaj d-ro Schmidt kune antaŭ la tombo.

⑪ 12 jan. en La Sagne, Svivujo. La pleiparto de la vojaĝo de s-ro Itoo en tiu lando estis afable aranĝita de s-ro Claude Gacond. La foto montras la familianojn de s-ro Gacond, kiu sidas maldekstre. S-ro Itoo ricevis la regalon per la *fondue*, kiun li tre ĝuis kaj notas, ke la kuirmaniero estas iom simila al la japana *suki-jaki* kvankam la ingrediencoj estas tute malsamaj. (Parenteze ni notu, ke ĉe f-ino M. Boulton en Anglujo s-ro Itoo estis regalita, laŭ lia raporto, per "japana-hispana-ĉina-hinda" festeno — kolekto da granda gastameco.)




⑫ 14 jan. en Veej, Svisujo. Fotografis la kunvenantojn, kiuj bonvenigis lin. Li skribas, ke la korvarmiga gastameco de la gesamideanoj tute forgesigis al li la intensan malvarmon de la ekstera vintro.

⑬ 17 jan. en La Sagne. Fotografis klasĉambron de 1^a elementa lernejo, kiun s-ro Itoo vizitis akompanate de s-ro Gacond. La ĉarmaj geknaboj kantis por li svisajn kantojn.

⑭ 16 jan. en Bern. S-ro Itoo staras antaŭ la oficejo de Esperanto-Instituto Svisa, kun s-ino H. Fischer rigardanta el la fenestro.

REDAKCIA NOTO: Nia pilgrimanto rondvojaĝas Eŭropon kiel jene: Svislando (jan. — feb.), Aŭstrio (feb.), Ĉeĥoslovakujo (feb.), Jugoslavujo (feb.), Italujo (marto), Francujo (marto), Hispanujo (marto), Portugalujo (marto) Parizo (aprilo), Londono (aprilo).

La 21-an de aprilo, li forlasas Londonon per ŝipo al Novjorko kaj restos en Usono, migrante diversajn urbojn, ĝis la 15-a de junio. Li hejmenvenos en la fino de junio.



Kolektanto de Elementaj Lernolibroj Nacilingvaj

Oni ja povas kolekti kion ajn: de poŝtmarkoj ĝis antikvaĵoj. Objektojn ne sole senanimajn sed ankaŭ vivajn. Mi ĵus aŭdis pri vidvino loĝanta en mia urbo Kioto, kiu kolektas hundojn — hundojn, kiujn ŝi renkontas vagantaj aŭ snufantaj pro malsato ĉirkaŭ ŝia domo. Unuvorte, senmastrajn hundojn. Mia unua reago al ŝia bonfaremo estis, ke ĝi meritus ordenon de iu asocio de animalprotektantoj. Sed io tia ne okazis. Kontraŭe, mi aŭdis, ŝin sieĝas la furioza 'venĝemo' de ĉiuj najbaroj, kiujn facile atingas la nokta kunhurlado de legio da hundoj. Grupo da proksimaj loĝantoj premis ŝin kaj protestis, sed vane. La plej neŭrozaj el ili kunkapiĝe konsiliĝis inter si, kiel procesi kontraŭ ŝi, por ke la tuta kvartalo regajnu al si unu el la plej fundamentaj civitanrajtoj: havi pacan dormon. Kiel la afero prosperis, aŭ malprosperis, mi ankoraŭ ne scias. Sed ĉiukaze, ŝia estas hobia: bestamo plus speco de kolektamo eksterordinara, se ne perversa. Ekster la radiuso de la racio, ĉiu hobia fariĝas manio. Plej

senriska el tia vidpunkto estas la kolektado de p. m., p. k., i. p. k., kaj aliaj, kiujn reprezentas ne ĉiam la liter-simboloj, sed kiujn ni trovas en la koresponda rubriko de niaj gazetoj. Temas nun pri tia kolektado — normala, sana, utila, ktp.

Por ke oni estu sukcesa kolektanto de ioj kaj alioj, oni bezonas en si sufiĉe da entuziasmo, diligento kaj persistemo kaj devas ilin kroni — per sistemo. Mi ne povas diri — por esti honesta al mi, ke ĉiu el tiaj virtoj mankas al mi en certaj rilatoj, kaj — gradoj; sed la spertoj jam konvinkis min, ke ili absolute mankas al mi, se temas pri *aktiva* kolektanto de io specifa; mi estas nur *pasiva* kolektanto, aŭ pli-ekzakte, amasiganto aŭ stapliganto de paperoj, presaĵoj kaj libroj, kiujn mi bezonus iam aŭ — neniam. Antaŭ multaj jaroj iu profesoro de kompara filologio rekomendis al mi, kolekti diverslingvajn eldonojn de la Biblio. La ideo ŝajnis al mi bonega. Mi decidis kaj eĉ intencis kolekti ilin — kiom eble plej multlingve, nur se eĉ por fari el ili beletan bibliotekon. Tamen mia bona intenco restis nur intenco. En mia libroŝranko nuntempe kuŝas la eldonoj japana kaj angla, kiujn mi posedis jam de antaŭ mia esperantistiĝo, kaj la hispana kaj portugala, kiujn disponigis al mi miaj afablaj esperantistoj-amikoj. Mi jam ne povas eĉ esperi, ke mi iam sukcesos kolekti la Biblion en multaj nacilingvoj. Kaj tion mi ne domaĝas.

Bela kontrasto al mia okazo estas Kikunobu Matuba,

mia kolego. Li kolektas lerno- aŭ legolibrojn de elementaj lernejoj el tra la tuta mondo. Dum la pasintaj dek jaroj li kolektis el 30 lingvoj 72 legolibrojn, inklude 19 sciencajn kaj matematikajn. Ili venis el Eŭropo kaj Azio; neniom ankoraŭ el la ceteraj kontinentoj. Per ili li ambicias fari komparan studon ne nur pri lingvaĵoj, sed ankaŭ pri diversnaciaj kulturfazoj kaj-nuancoj akcentitaj en ili. De tempo al tempo li publikigas la rezultojn de sia studo. Antaŭ nelonge, la loka ĵurnalo *Kanagawa-Sinbun* prezentis la enhavon de lia kolekto, klasifikitan laŭ la lingvoj, landoj, lernofakoj ktp., kun mencio pri la pedagogiaj principoj de diversaj landoj, konjekteblaj el la presitaj tekstoj kaj desegnaĵoj. Aliflanke, la aŭgusta numero de *Romazi Sekai*, monata organo de la *Nihon Romazi-kai* (Asocio por la latinigo de la japana ortografio) publikigis traktaĵon de Matuba sub la titolo, "Lernolibroj enhavantaj tekston kun silab-tranĉitaj frazoj". Ek-

zemplo el la franca:

Lou i se est de ja u ne fi llet te: el le a huit ans.

Sa fa mi lle par le pa tois.

Tiajn ekzemplojn kun silab-tranĉitaj frazoj li citas el la franca, ĉeĥa, estona, hungara, finna, perua (hispana), norvega, germana, latva kaj hispana — kun necesaj komentoj. Tia studo kredeble estas interesa kaj utila por la japanaj *Romazi*-istoj kaj *Romazi*-instruantoj en la elementaj lernejoj.

Matuba estas dotita per tiaj virtoj, kiaj mankas al mi. Kiom mi deziras ke en lian studĉambron inundus torento da nacilingvaj lernolibroj el ĉiuj kontinentoj kaj el ĉiuj mondpartoj, por ke li dronu en ili!

T. Mikami

(Redakcia noto: Por tiuj, kiuj ekinteresiĝos pri la kolektado de s-ro Matuba kaj eventuale bonvolos kontribui "brikojn" al li, ni aldonas lian adreson: Kikunobu Matuba, Huzimityo, 3-82, Yokosuka, Japanujo.)

Japanaj Vizaĝoj

(23) Grandioza Argumentanto

Inter la dokumentaj paperoj de la Tempjoo-periodo (710-794), kiuj registris la progresadon de la sutro-kopiado — konservataj ĉe la Imperia Ŝoosoo-in-trezordomo, Nara — troviĝas unu malneta, sur kiu karikaturo estas fanke desegnita. Super tiu desegnaĵo oni legas: "grandioza argumentanto". Ĝi montras viron, kiu en fierega pozo "argumentas". La desegninto povus esti iu el la sutrokopiistoj aŭ maleminentaj oficistoj de tiu tempo. La karikaturita viro ankaŭ estus unu el tiaj: vestita laŭ ĉina modo kaj havanta tre malelegantajn trajtojn. Lia vizaĝo estas en la akra kontrasto kun tiu de la "belulinoj de la Tempjoo" (vd. n-rojn 14, 15, 17). Se tiuj virinoj estas pli-malpli aristokrataj, ĉi tiu viro estas el simpla kaj ordinara klaso. Li, desegnita de nepentristo, ne prezentas belan arton, tamen sufiĉe bone montras la vivplenan esprimon kaj movon de verva "argumentanto," per fortaj penik-strekadoj.

Tadaŝi Joŝida, belarta kritikisto

Trad. P.M.



S-ro Matuba kun parto de la kolektitaj lernolibroj



Kolektanto de Elementaj Lernolibroj Nacilingvaj

Oni ja povas kolekti kion ajn: de poŝtmarkoj ĝis antikvaĵoj. Objektojn ne sole senanimajn sed ankaŭ vivajn. Mi ĵus aŭdis pri vidvino loĝanta en mia urbo Kioto, kiu kolektas hundojn — hundojn, kiujn ŝi renkontas vagantaj aŭ snufantaj pro malsato ĉirkaŭ ŝia domo. Unuvorte, senmastrajn hundojn. Mia unua reago al ŝia bonfaremo estis, ke ĝi meritus ordenon de ia asocio de animalprotektantoj. Sed io tia ne okazis. Kontraŭe, mi aŭdis, ŝin sieĝas la furioza 'venĝemo' de ĉiuj najbaroj, kiujn facile atingas la nokta kunhurlado de legio da hundoj. Grupo da proksimaj loĝantoj premis ŝin kaj protestis, sed vane. La plej neŭrozaj el ili kunkapiĝe konsiliĝis inter si, kiel procesi kontraŭ ŝi, por ke la tuta kvartalo regajnu al si unu el la plej fundamentaj civitanrajtoj: havi pacan dormon. Kiel la afero prosperis, aŭ malprosperis, mi ankoraŭ ne scias. Sed ĉiuokaze, ŝia estas hobia: bestamo plus speco de kolektamo eksterordinara, se ne perversa. Ekster la radiuso de la racio, ĉiu hobia fariĝas manio. Plej



S-ro Matuba kun parto de la kolektitaj lernolibroj

senriska el tia vidpunkto estas la kolektado de p. m., p. k., i. p. k., kaj aliaj, kiujn reprezentas ne ĉiam la liter-simboloj, sed kiujn ni trovas en la koresponda rubriko de niaj gazetoj. Temas nun pri tia kolektado — normala, sana, utila, ktp.

Por ke oni estu sukcesa kolektanto de ioj kaj alioj, oni bezonas en si sufiĉe da entuziasmo, diligento kaj persistemo kaj devas ilin kroni — per sistemo. Mi ne povas diri — por esti honesta al mi, ke ĉiu el tiaj virtoj mankas al mi en certaj rilatoj, kaj — gradoj; sed la spertoj jam konvinkis min, ke ili absolute mankas al mi, se temas pri *aktiva* kolektanto de io specifa; mi estas nur *pasiva* kolektanto, aŭ pli-ekzakte, amasiganto aŭ stapliganto de paperoj, presaĵoj kaj libroj, kiujn mi bezonus iam aŭ — neniam. Antaŭ multaj jaroj iu profesoro de kompara filologio rekomendis al mi, kolekti diverslingvajn eldonojn de la Biblio. La ideo ŝajnis al mi bonega. Mi decidis kaj eĉ intencis kolekti ilin — kiom eble plej multlingve, nur se eĉ por fari el ili beletan bibliotekon. Tamen mia bona intenco restis nur intenco. En mia libroŝranko nuntempe kuŝas la eldonoj japana kaj angla, kiujn mi posedis jam de antaŭ mia esperantistiĝo, kaj la hispana kaj portugala, kiujn disponigis al mi miaj afablaj esperantistoj-amikoj. Mi jam ne povas eĉ esperi, ke mi iam sukcesos kolekti la Biblion en multaj nacilingvoj. Kaj tion mi ne domaĝas.

Bela kontrasto al mia okazo estas Kikunobu Matuba,

mia kolego. Li kolektas lerno- aŭ legolibrojn de elementaj lernejoj el tra la tuta mondo. Dum la pasintaj dek jaroj li kolektis el 30 lingvoj 72 legolibrojn, inklude 19 sciencajn kaj matematikajn. Ili venis el Eŭropo kaj Azio; neniom ankoraŭ el la ceteraj kontinentoj. Per ili li ambicias fari komparan studon ne nur pri lingvaĵoj, sed ankaŭ pri diversnaciaj kulturfazoj kaj -nuancoj akcentitaj en ili. De tempo al tempo li publikigas la rezultojn de sia studo. Antaŭ nelonge, la loka ĵurnalo *Kanagawa-Sinbun* prezentis la enhavon de lia kolekto, klasifikitan laŭ la lingvoj, landoj, lernofakoj ktp., kun mencio pri la pedagogiaj principoj de diversaj landoj, konjekteblaj el la presitaj tekstoj kaj desegnaĵoj. Aliflanke, la aŭgusta numero de *Romazi Sekai*, monata organo de la *Nihon Romazi-kai* (Asocio por la latinigo de la japana ortografio) publikigis traktaĵon de Matuba sub la titolo, "Lernolibroj enhavantaj tekston kun silab-tranĉitaj frazoj". Ek-

zemplo el la franca:

Lou i se est de ja u ne fi llet te: el le a huit ans.

Sa fa mi lle par le pa tois.

Tiajn ekzemplojn kun silab-tranĉitaj frazoj li citas el la franca, ĉeĥa, estona, hungara, finna, perua (hispana), norvega, germana, latva kaj hispana — kun necesaj komentoj. Tia studo kredeble estas interesa kaj utila por la japanaj *Romazi*-istoj kaj *Romazi*-instruantoj en la elementaj lernejoj.

Matuba estas dotita per tiaj virtoj, kiaj mankas al mi. Kiom mi deziras ke en lian studĉambron inundus torento da nacilingvaj lernolibroj el ĉiuj kontinentoj kaj el ĉiuj mondpartoj, por ke li dronu en ili!

T. Mikami

(Redakcia noto: Por tiuj, kiuj ekinteresiĝos pri la kolektado de s-ro Matuba kaj eventuale bonvolos kontribui "brikojn" al li, ni aldonas lian adreson: Kikunobu Matuba, Huzimityo, 3-82, Yokosuka, Japanujo.)

Japanaj Vizaĝoj

(23) Grandioza Argumentanto

Inter la dokumentaj paperoj de la Tempjoo-periodo (710-794), kiuj registris la progresadon de la sutro-kopiado — konservataj ĉe la Imperia Ŝoosoo-in-trezordomo, Nara — troviĝas unu malneta, sur kiu karikaturo estas fanke desegnita. Super tiu desegnaĵo oni legas: "grandioza argumentanto". Ĝi montras viron, kiu en fierega pozo "argumentas". La desegninto povus esti iu el la sutrokopiistoj aŭ maleminentaj oficistoj de tiu tempo. La karikaturoita viro ankaŭ estus unu el tiaj: vestita laŭ ĉina modo kaj havanta tre malelegantajn trajtojn. Lia vizaĝo estas en la akra kontrasto kun tiu de la "belulinoj de la Tempjoo" (vd. n-rojn 14, 15, 17). Se tiuj virinoj estas pli-malpli aristokrataj, ĉi tiu viro estas el simpla kaj ordinara klaso. Li, desegnita de nepentristo, ne prezentas belan arton, tamen sufiĉe bone montras la vivplenan esprimon kaj movon de verva "argumentanto," per fortaj penik-strekadoj.

Tadaŝi Joŝida, belarta kritikisto Trad. P.M.



Pri Vojaĝo al Eŭropo

La 24an, majo 1959 mi enŝipiĝis en la argentina vaporŝipo "Alberto Doderó", kiu forveturis vespere de la haveno de Buenos Aires.

En Santos (Brazilo) atendis min ĉe la kajo grupo da tieaj samideanoj, kiuj akompanis min tra la urbo kaj ĝiaj vidindaĵoj.

En Rio de Janeiro mi vizitis la ejon de la Esperantista Kooperativo, kiu troviĝas en la plena centro de la urbo, fronte al la Urba Teatro. Multenombraj libroj en kaj pri Esperanto estas tie ekspozicie prezentataj kaj vendataj. Ĉian presejon ("Gráfica Esperanto"), kiu kuŝas en la kvartalo Sankta Kristoforo, mi ankaŭ vizitis. Tiu Kooperativo vigle kaj efike laboras kaj ĝi bone prosperas malgraŭ kelkaj ekonomiaj malfacilaĵoj. Menciinda estas ĝia organo, kiu regule aperas en portugala kaj Esperanta lingvoj.

Mi ankaŭ vizitis en Rio de Janeiro, kie li nun loĝas, la katolikan ĉinan pastron Kao, bone konata en Esperantujo, kiu antaŭ multaj jaroj vizitis Argentinon.

Hazarde mi renkontis en la sidejo de la Esperantista Kooperativo paron da vegetaranaj samideanoj de Recife, kiuj ĵus fondis esperantistan kolonion en Veadeiros (ŝtato Goiás), je la distanco de 240 kilometroj de Brasília, la nova ĉefurbo de la lando. Ili invitas la esperantistojn de la tuta mondo al kunlaboro.

Mi profitis la transatlantikan vojaĝon por instrui Esperanton surŝipe. Kurseto estis anoncita per laŭtparolilo kaj dudeko da personoj ĉeestis la unuan lecionon. Tiu nombro grade malpliiĝis kaj nur kvar personoj finis la kurseton inter kiuj

profesorino pri lingvistiko ĉe la Nacia Universitato, en Rosario de Santa Fé.

Mia ŝipo alvenis al Hamburgo la 14an, junio; tio signifas, ke ĝi malfruiĝis je unu tago.

Dum pli ol unu monato mi vojaĝis tra la norda parto de Germanujo kaj vizitis hospitalojn, sanatoriojn kaj aliajn institutojn, kiuj profesie interesis min. Kaj poste, al Polujo!, la unua lando malantaŭ la fera kurteno, kiun mi vizitis.

Mi pasigis plurajn agrablajn tagojn en Poznań, Łódź, Łowicz; vizitis la palacojn de Arcadia kaj Nieborów, kaj finfine alvenis al Varsovio unu semajnon antaŭ la malfermo de la 44a Universala Kongreso de Esperanto. Dum la solena inaŭguro, mi salutis la kongresanaron je la nomo de Argentina Esperanto-Ligo. Mi renkontis kelkajn konatulojn: S-ro Itoō, kiun mia fratino Rora kaj mi trovis en Kameoka (Japanujo) en 1956; geedzoj Peterson, kiujn ni vizitis en Kalifornio (Usono) en 1957; Tibor Sekelj, kunfondinto de Argentina Esperanto-Ligo, k. t. p.

La esperantista ĵurnalaro jam detale raportis pri la 44a U. K. kaj mi ne faros tion denove. Mi nur diros, ke la 44a U. K. estis grandioza manifestacio de la tutmonda samideanaro en vere internacia atmosfero. Ĝi plene sukcesis dank' al la laboro de la organizintoj, la entuziasmo de la partoprenintoj kaj la apogo de la pola registaro. La monumenta Palaco de Kulturo kaj Scienco estis inda ejo por tiu impona kunveno.

Rimarkinde estas, ke nur Esperanton oni povis aŭskulti ĉe la kongresanaro, kiu alvenis al Varsovio de la kvin

kontinentoj de la mondo kaj pruvis praktike la taŭgecon de nia kara lingvo en ĉiuj rilatoj.

Mi ankaŭ partoprenis la kvintagan postkongreson kun vizitoj al la interesplena urbo Krakovo, la salminejoj de Wieliczka, la novkonstruita industria urbo Nowa Huta, la pitoreska ripozloko Zakopane kaj ĉirkaŭaĵoj, la montaroj Pieniny, la rivero Dunajec, sur kiu ni estis flosigitaj laŭlonge 24 kilometrojn, k. t. p.

Post la fermo de la postkongreso, mi vizitis Auschwitz (Oświęcim, en pola lingvo), kie antaŭ ne multaj jaroj la germanoj torturis, gasumis kaj poste bruligis 4,300,000 senkulpajn homojn inkluzive suĉinfanojn. Tiu koncentreja kampo (unu inter multaj aliaj, kiuj kuŝas en Polujo kaj aliaj eŭropaj landoj, kaj kie la germanoj ankaŭ ekstermis multajn milionojn da aliaj senkulpuloj) funkcias nun kiel nacia muzeo por ke la homaro ne forgesu la plej monstrajn krimegojn registritajn en la tuta homa historio.

Wrocław estas la lasta pola urbo, kiun mi vizitis. Poste, mi forlasis Polujon, bone impresita de ĝia ĝentila kaj gastama popolo.

La ĵus okazinta Universala Kongreso sendube influos favore sur la esperanta movado en tiu lando kaj mi esperas, ke ĝi baldaŭ ekfloros kiel antaŭ la dua mondmilito.

Reveninte al Germanujo, mi travojaĝis ĝian centran kaj sudan parton kaj plue vizitis kuracejojn kaj aliajn medicinajn institutojn.

Mi estis tre surprizita kiam samideano, kiun mi hazarde renkontis en Hannover surstrate, diris al mi, ke tuj post la fino de la lasta mondmilito la nombro da

samideanoj en Germanujo estis multe pli granda ol nun. Ekzemple, en Hannover, de 600 restas nur 100. La samo okazis en la tuta lando. Mi restis ankoraŭ pli surprizita kiam li klarigis al mi la kialon: Ili lernis Esperanton por skribi leterojn al eksterlandaj samideanoj petante monon kaj pakaĵojn da manĝaĵoj, vestaĵoj, k. t. p., kiujn ili urĝe bezonis tiutempe. Kiam la ekonomia situacio pli-boniĝis en la lando kaj ili ne plu bezonis eksterlandan helpon, ili forlasis Esperanton kaj ĝin forgesis. (Idealismo pura, ĉu ne?)

Finfine mi enŝipiĝis en Amsterdamo (Nederlando) kaj revenis al Argentino.

Surŝipe mi denove gvidis esperantan kurseton. La unuan lecionon ĉeestis kvardeko da personoj el kiuj ses finis la kurson. Inter tiuj ĉi ĥirurgo de Ĉilio kun sia edzino kaj argentina sacerdoto.

Mi alvenis al mia hejmo post duonjara foresto. Kiel rezulto de miaj travivaĵoj en Polujo okaze de la 44a Universala Kongreso de Esperanto, mia konvinko pri la fina triumfo de nia kara lingvo estas nun pli firma ol iam antaŭe.

Avizo

La plano de la Japana Asocio de Universitataj Diplomitoj eldoni verkon, "Daŭrigo: La Respekto de l' Vivo" de d-ro S. Komaki en Esp-a trad. de T. Nakamura, ne povis efektiviĝi pro ne-sufiĉa nombro de antaŭmendoj, kiujn ni ricevis. Al ĉiuj antaŭmendintoj ni jam repagis. Al ĉiuj gazetejoj, kiuj afablis por ni publikigi anoncon pri la supra plano, ni kore dankas kaj petas indulgon repreni ĝin.

La Red. de Oomoto

Japanujo Misprezentita Eksterlande

Antaŭ nelonge, multaj japanoj vizitis la ekspozicion "Japanujo Misprezentita" ĉe la Mitukosi-Ĉiovendejo en la urbocentro de Tokio. Ili ricevis nigre-humuran impreson kiam ili tie havis la okazon rigardi sin kiel la alinacianoj vidas ilin. Ilia reago estis amalgamo da amuziĝoj kaj disreviĝoj.

Pli ol 600 lernolibroj el 35 landoj estis elmontritaj en la ekspozicio, kiun iniciatis la Internacia Societo por Eduka Informado kaj kiun subtenis kvar Ministerioj de la Japana Registaro kun la intenco korekti la "erarojn". La fremdlingvaj lernolibroj estis ĉefe geografiaj, historiaj kaj sociaj, destinitaj por klasĉambroj kaj eldonitaj inter 1955 kaj 1959.

El Aŭstralia lernolibro la vizitantoj lern'is, ke la rikiŝo estas la ĉefa trafikilo en japanaj urboj, pli uzata ol motorveturiloj. La spektantoj venis en la ekspoziciejon rekte el la stratoj kun la trafiko plej moderna kaj granda en Azio, kaj multaj el ili neniam eĉ vidis tiun objekton nomatan "rikiŝo".

En Usona geografia libro ili vidis foton de "moderna" silkfabriko en Jokohama, kie nur iliaj avinoj estus laborintaj, sed certe ne ili.

La plimulto de tiuj libroj estis eldonitaj antaŭ du-tri jaroj, tamen ili montras la Japanujon, kiu forpasis antaŭ 30 aŭ 40 jaroj — la kuriozan landon nur de rikiŝoj, delikataj ĝardenoj, geĵoj, Monto Fuji, ktp. Preskaŭ neniu el la kompatindaj geknaboj de l' elementaj kaj mezaj lernejoj en eksterlando povas ricevi el tiuj libroj la ĝustan bildon pri Japanujo kiel la ĉefa industria potenco en Azio — la lando tiel modernigita en ĉiuj rilatoj kiel iu ajn Okcidenta nacio. Kelkaj libroj eĉ prezentas tian Japanujon, kiu — niniam ekzistis.

Hinda elementa lernolibro montras ĉinan kulion tiranta rikiŝon, sur kiu sidas

grasdika mandareno kun vanghararo kaj nomas ĝin "vidaĵo de moderna Japana strato". Tiu sama libro montras ĉinan ŝipeton velanta en la ombro de Monto Fuji.

Itala lernolibro por liceanoj montras japaninon, kiu estas tatuita sur la tuta dorso, kaj komentas, ke tatui ankaŭ virinojn estas la ĝenerala kutimo en Japanujo! Alia itala libro por elementaj lernejoj fiksas la nombron de la Japana loĝantaro en 1957 je 62,775,000 — dudek milionojn malpli ol la aktuala cifero en la koncerna jaro.

Usona geografia libro montras, "kiel Japanoj dormas", per la foto de du geĵoj kuŝantaj sur la planko, kun iliaj kapoj apogitaj sur kapo-bretoj ĉe la nuko por ke ilia delikata hararanĝo ne estu malordigita.

Angla bild-historia libro por geknaboj konfuzas la geĵon kun "virino de la supra klaso" kaj vual-portan mahometaninon kun "Japana virino en vintra robo".

Sveda geografia libro prezentas grupon da kelkaj "japanaj sinjorinoj," kiuj trinkas teon. Jes, tamen, la virinoj estas geĵoj kaj majkoj (trejnatoj por fariĝi geĵoj), plenumantaj la te-ceremonion.

Egipta lernolibro montras "Japanan gastoĉambron" kun ĉinaj dekoraĵoj, en kiu japano negliĉe-vestita akceptas egiptan gaston — eŭropstile vestitan!

Estas evidente, ke preskaŭ ĉiuj libroj "elfosis" antikvajn fotojn kaj bildojn por ilustri la paĝojn pri Japanujo kaj la Japana popolo, ke ili "ĉerpis" misinformojn el disponeblaj enciklopedioj (la *Encyclopedia Britannica* kaj la *Larousse* ne estas senkulpaj). Libroj el Jugoslavujo, Italujo, Svedujo, Izraelo, Sovetio kaj aliaj prezentas la stratojn de Japanujo de la 1920-aj jaroj kaj klarigas, ke ili estas "modernaj". Kaj tiel plu. (Dan Rak)

Recenzo

★ NIA HEJMO, mediume skribita de Francisco Candido Xavier por la Spirito de Andreo Ludoviko. El la portugala, esp-igis L. C. Porto Carreiro Neto. Eldonfako de Federação E. Brasileira, Avenida Passos, 30, Rio de Janeiro, Brazilo. 237 paĝoj (12.5 X 18 cm). Prezo ne montrita.

Nia Hejmo estas kolonio de la spiritoj, fondita de eminentaj portugaloj elkarniĝintaj en Brazilo en la 16-a jarcento kiel orgnaizaĵo de misiuloj kun frata amo, en unu regiono de la *Ombrejo*, la malalta spirita regno, kiu proksimas la Teron. Pri sia unujara travivado en tiu ĉi kolonio la spirito de la mortinta kuracisto Andreo Ludoviko (anonimo) pere de mediumo rakontas al ni en la verko sufiĉe konkrete.

Laŭ spiritismaj legaĵoj mi scias ke eĉ spirita mondo, se ĝi ne estas supera, ankoraŭ estas sub la jugo de pli-malpli materiecaj kondiĉoj. Sed kiom mi komprenas, la verko plej distingas sin el inter aliaj spiritismaj verkoj, koncerne la klaran konkretigon de la transmondaj materiecaj fenomenoj. Ĝi vere prezentas al ni kelkajn karakterizaĵojn kiuj bezonas esti konigitaj en la spirit-scienco.

Unu el ili estas lingva problemo. Oni pensas, ke ĉiuj spiritoj interkomunikiĝas per la vibro de la penso. Pri tio loĝanto de Nia Hejmo instruas: "Ni staras ankoraŭ tre malproksime de la idealaj regionoj de la menso pura. Kiel sur la Tero, tiel same, ĉe ni tiuj, kiuj perfekte

harmonias, kapablas interŝanĝi pensojn sen la idiomaj baroj; sed entute ni ne povas flanken meti la formon, laŭ la vasta senco de la vorto. ... Ankaŭ ĉi tie la naciajn kaj lingvajn posedaĵojn ĉirkaŭbaras psikaj limoj. En la plej diversaj fakoj de nia spirita laborado ekzistas granda nombro da Spiritoj liberaj de ĉia limigo, tamen estas grave konsideri, ke la plej multaj havas tiajn limigojn." (La tradukinto piednotas: Ekzistas granda esp-movado en la Transmondo.) En Nia Hejmo oni ankaŭ havas la saman sistemon de la tempo kiel sur la Tero. Tie cetere troviĝas ĉiaj vivnecesaĵoj, veturiloj, televidoj, por ne diri pri riveroj, montoj, floroj, kaj bestoj, tute similaj kiel en nia mondo.

Alia problemo estas: En Nia Hejmo jam regas ordo, justo, amo, frateco. ... , malgraŭ ke ĝi okupas angulon de tiel malsubtila materieca regiono. La organizo de la kolonio dividiĝas en ses ministerioj, nome: de Regenerado, Helpejo, Komunikado, Klarigo, Altigo kaj Dia Unuigo. La administraj laboroj estas misiiste sanktaj. Kiel ekzemple, en la Ministerio de Helpejo oni akceptas malsanulojn, aŭdas petojn, dispecigas preĝojn, preparas surterajn reenkarneigojn, organizas taĉmentojn por helpejo al la loĝantoj de la Ombrejo aŭ al la plorantoj sur la Tero, serĉas por ĉiaj aferoj koncernantaj suferon. Ne mankas grandaj fabrikoj kie la preparado de sukoj, de teksaĵoj, unuvorte, de ĉiaj ellaboraĵoj havigas okupon al pli ol cent mil homoj, kiuj per unu fojo revirtiĝas kaj lumigas al si la menson. La tuta organizaĵo esence estas la mondo de laboro, farado kaj lernado; ĝi neniam similas al tia paradizo, kie oni povas ĝui *mallabore* la pacan vivon kiel imagas homoj sur la tero. Tieaj moralo kaj etiketo sekve diferencas de tiuj de nia mondo: En la

rondoj de la karno oni havas la kutimon gratuli iun, kiu atingis finanĉan prosperecon aŭ bonegan socian pozicion, dum ĉi tie oni estimas komprenemon, individuon klopodon, sinceran humilecon. Ĉiuj oficistoj jam nutras en si abnegacian servemon por la kolonio, prenante sian provon por la kolektiva. La ekzisto de tia organizaĵo donas al ni la karnuloj grandan esperon, kuraĝon kaj konsolon.

Ancoraŭ alia afero: la seanco okazas ankaŭ en la transmondo. Mi tamen ĉi tie preterlasu la mencion pri ĝi pro manko de la spaco. Mi povas trovi en la rakonto krom ĉi tiaj diversajn edifajn moralaĵojn kaj sugestiojn, kiujn ni devas lerni por nia individua aŭ kolektiva progresigo. La tuta enhavo resume estas tre interesa kaj valoras por ekscii la nekonatajn transmondajn aferojn kaj neglektatajn homajn devojn sur la Tero. Dum la legado ĉiam pli kreskis mia miro kaj plezuro. Mi tamen trovis unu bedaŭreton, kiam mi vane serĉis, kie reale situas la Malumo, la plej malalta regiono, kvankam la aŭtoro plurfoje mencias pri ĝi.

La lingvaĵo estas tre bona. Mi kore gratulas kaj dankas al la tradukinto kaj la eldoninto pro ilia daŭra sindona aktiveco. En la libro oni mencias ke la originalo en portugala lingvo jam atingis sian 7-an eldonon: pruvo ke ĝi estas multe legata.

Menciite ankaŭ ke la libro estas la unua el serio de dek verkoj de unu sama spirito, Andreo Ludoviko. La plua eldonado de la ceteraj ĉiuj verkoj en Esperanto estas atendata.

N. Esami

★ LA NATURA METODO POR RESANIĜI, verkita kaj eldonita de Frateca Asocio Internacia "Amo kaj Vivo", 36, rue de Lancry, Paris-X, Franc.

ujo (korespondadreso: 28, rue R.-Lefevre, Bagnolet, Seine, Francujo). 45 paĝoj (13.5×19 cm). Prezo: 200 fr.

La broŝuro unuvorte temas pri naturisma medicino: la sana nutrado, la sun- kaj aer-bano, la bonfaroj de la argilo, de la integra spirado, de la helioterapio, de la fasto, de la fruktokuracado ktp.

La naturismo estas universala; mi mem por kuraco aplikas puran argilon per kataplasmo kaj, por la interna perturbo, trinkas ĝin akvumitan kaj tio estas bonefika. Mi scias ankaŭ ke la postaĵbano estas ankoraŭ tradicie observata de kelkaj japanoj. Ĉi neniam estos forlasita.

Al ĉiuj legantoj, kiuj kaptis la ĝeneralan ideon pri la naturista medicino el la artikolo de d-ro Jaime Scolnik "Kiel Kuracas la Naturista Medicino" (pj. 108-113 kaj 176-182 de OOMOTO 1958), mi rekomendas tiun ĉi broŝuron, kiu prezentas ĉefe la praktikan metodon. *N. E.*

★ MONTO DE L' VIRINO, broŝuro de 13 vietnamaj legendoj; eld. de Fremd-lingva Eldonejo, 189 Phô Bì Tri ĉn, Hanoi, Vietnamio. 95 paĝoj (12×19 cm). Prezo ne montrita.

★ EKSKURSO EN NOMBROJ, matematika verko de F. Emerson Andrews. Eld. de Tha Duodecimal Society of America, 20 Carlton Place, Staten Island 4, N.Y., Usono. 12 paĝoj (15×21cm).

La aŭtoro rekomendas la uzon de la dozena nombro-sistemo anstataŭ la decimala sistemo, asertante ke la unua sistemo donas multajn avantaĝojn en nia ĉiutaga vivo. La duaparta klarigo tamen ŝajnas pli-malpli konfuziga por la nefortuloj je matematiko kaŭzante al ili sciencan dispepsion. Unuopaj ekzempleroj estas senpage haveblaj ĉe la supre menciita societo.

★ HOMO — Bildkarto, Serio 1, konsistas el 8 plurkoloraj il. poŝtkartoj deŝireblaj, kun bildkovrilo; eld. de Ĉina Esperanto-Ligo, P.O.Kesto 77, Pekino, Ĉinujo. Prezo: Rb. 0.80, gld. 0.50, Us dol 0.20.

El la pentraĵoj faritaj laŭ la ĉina tradicia maniero oni povas vidi parton de la aktuala vivo de ĉinaj kamparanoj kaj ankaŭ de vilaĝaj pejzaĵoj. Dezirata estas ankaŭ la eldono de ĉinaj klasikaj pentraĵoj.

★ WUPPERTAL, 12-paĝa turisma gvidilo pri la plej granda urbo de Bergisch Land inter Rejno kaj Ruhr, Germanujo. Senpage havebla ĉe Presse- und Werbeamt, Wuppertal, Germanujo. Nepre skribu esp-e kaj menciu; "Esp.-prospekto pri W".

★ NÜRNBERG, 8-paĝa turisma faldfolio kun la landkarto kaj fotoj pri la urbo, la kultura kaj ekonomia centro de Germanujo. Havebla ĉe Verkehrsverein Nürnberg E.V., Germanujo.

★ STEIERMARK, turisma faldfolio kun grandformata landkarto kaj multaj kolorbildoj pri la aŭstra lando Stirio. Teksto en lingvoj germana, angla, franca kaj itala. Aldonita la 2-paĝa folieto kun artikoleto en Esperanto: "Stirio—Feria Revu". Eld. de Landesfremdenverkehr-samt für Steiermark, Landhaus, Graz, Aŭstrujo.

★ GRAZ, turisma faldfolio kun landkarto kaj multaj kolorilustraĵoj pri la aŭstra ĝardenurbo. Teksto en la lingvoj samaj kiel la supra mencio pri Steiermark. Aldonita la 1-paĝa folieto kun artikoleto en Esperanto: "Graz kiel turisma urbo". Havebla ĉe la supra eldoninto.

★ RAVENNA, turisma 32-paĝa gvidlibreto kun ilustraĵoj pri la itala historia kaj kultura urbo. Eld. de Esperanto-grupo, P.Anita Garibaldi 1, Ravenna, Italujo. Senpage havebla ankaŭ ĉe Azienda Autonoma di Soggiorno e Turismo, Ravenna, Via XIII Giugno, 2a, Italujo.

*Knabino elektas
siajn
edniĝajn kimonojn.*

(Foto de Unesko
Inform-servo)



Memuaro pri la Kanto de Kverka Monto (1)

— “Narayama-busi kō”*) —

Trans unu monto kuŝas la alia; kiom ajn iru, tiom daŭras senfinaj vicoj da montoj. Intermonde, tie en la provinco Sinsyō, troviĝis vilaĝo nomata “la transa vilaĝo” kaj ĉe unu limo de tiu, staris la domo de Rin. Antaŭ ŝia domo elstaris la zeltkorbarba trunkeg-stumpo, kies surfaco estis tiel plata-glata, ke sur ĝi okaze sidiĝante, buboj aŭ preterpasantoj profitadis la oportunon. Jen kial la domo de Rin estis nomata: la Stumpo. En tiun domon Rin venis kiel novedzino antaŭ pli ol kvindek jaroj. La vilaĝanoj nomis la vilaĝon de ŝia deveno ankaŭ “la transa vilaĝo”. La du vilaĝoj ne havis la propran nomon kaj tial, nomadis sin reciproke “la transa vilaĝo”. Efektive, ili kuŝis ambaŭsube de unu montara ĉeno.

Rin estis 69 nunjare. Ŝia edzo jam mortis antaŭ dudek jaroj. La edzino de ŝia solfilo Tatuhei mortis pasintjare, kiam ŝi, irante kolekti kaŝtanojn, rulfalis en la fundon de interkrutejo. Prizorgadi la kvar nepojn postlasitajn estis avina devo por Rin, sed serĉi postedzinon por ŝia vidvigiinta filo estis la pli kaprompa. Ĉar nek en ĉi tiu nek en la transa vilaĝo estis trovebla taŭga vidvino.

Iun tagon Rin fine aŭdis la du voĉojn, kiujn ŝi priatendis. Unue, en tiu mateno, ŝi aŭdis iun kantante iri al la monto post ŝia domo — la festivalan kanton:

*Se la Fest' de Kverka Monto
la trian fojon venis,
floras jam la kaŝtanoarbo,
ni kiun iam semis.*

Tio ĉi estis la Bon-festivala dancokanto¹⁾ de la vilaĝo, kiun Rin atendis jam en ĉiu momento aŭdi de iu ajn unua, ĉar nun preskaŭ sezonas por tio. Sed ĝis nun, ĉijare, neniun ankoraŭ ekkantis, kaj Rin estis malkvieta. Se tri jaroj pasis, ĝi signifis, oni fariĝas tri jarojn pli maljuna. Ĉiu en la vilaĝo, kiu atingis la aĝon de sepdek jaroj, pilgrimis al la Kverka Monto, kaj la kanto ankaŭ servis por priatentigi al ĉiu grandaĝulo la proksimiĝon de tiu tempo.

Rin klinis la oreilon al la direkto, kien la kanto foriĝas. Ŝi ŝtelrigardis en la vizaĝon de Tatuhei, kiu staris apude: ankaŭ li streĉe aŭskultas kun sia mentono antaŭen ŝovita, kvazaŭ ĉasanta la forirantan kantovoĉon. Tamen, liaj okuloj glimbriladas, kaj jen la nekutima esprimo de l' okuloj ne lasis ŝin preterrimarki, ke al li — kiu akompanos ŝian pilgrimon al la Kverka Monto — ne mankas la sento de kaŝita zorgo pri ŝia afero. Io varma premis al ŝi en la brusto: — Tiel mildkora karulo estas mia filo!

La alia voĉo, kiun Rin ĝisatendis, estis de la afabla kuriero, kiu de ŝia naskiĝdomo venis informi ŝin, ke tie en

la transa vilaĝo estiĝis vidvino. Li sciigis, ke la vidvino estas kvardekkvin-jara, samaĝa kiel Tatuhei, kaj la funebra ceremonio de ŝia edzo pasis nur antaŭ tri tagoj. Se ne misharmonia estas la aĝoparo, tio egalas preskaŭ la elfariĝon de edzoparo. La kuriero venis kun komision nur komuniki novaĵon pri vidvino, certe. Sed kiam adiaŭinte li foriris, jam estis fiksita eĉ la dato de ŝia alveno domen por edziniĝo. Intertempe Tatuhei estis forestanta, sed ne Rin sola decidis ĝin: nome, ĉio per si mem aranĝiĝis tiel, kiel ĝi nur povis aranĝiĝi dum ŝi aŭskultadis la vortojn de la kuriero. Nun restas nur sciigi ĝin al Tatuhei, kiam tiu revenos hejmen. La problemo de geedziĝo en ĉiu familio estis io tiel facile solvebla. Ne estis tia kutimo, ke la interamantaj geviroj libervole promesas interedziĝon, nek tia formalajo, kia eĉ la geedziĝa ceremonio. Nur necesis, ke la virino transloĝigu sin en la domon de la viro. Se intervenis svatisto kiel ĉiam, lia tasko estas finita apenaŭ li trovas la aĝojn de la paro pli-malpli interharmoniaj. De tiam la virino sub iu aŭ alia preteksto vizitadas la domon de la viro, baldaŭ algluiĝas restade kaj, dum oni ne scias, estas absorbita kiel membro de la familio. La vilaĝanoj havis la Bon-festivalon kaj la Novjaran feston kiel ĉie aliloke, tamen dum la festotagoj ili nur ripozis de ĉiutaga laboro — por nenio aparta, ĉar cetere troviĝis nenia loko, kiun ili vizitu ferie. Festomanĝon ili preparis escepte en la festivalo de Kverka Monto: en ĉiuj aliaj festokazoj ĉio estis tiel simpla kiel ordinare.

Rin rigardis al la direkto, kien la kuriero forpaŝis. Li estis sendita, li mem diris, de ŝia naskiĝdomo, sed ŝi pensis, ke li devus esti iu proksima parenco de la virino. Apenaŭ tri tagoj pasis de post la morto de ŝia edzo, jam la kuriero tuj

alkuris al la domo de Rin por pridecidi ŝian reedziĝon: laŭ tio, Rin imagis, kiom granda estis la onia embaraso, priaranĝi la postvivon de la virino. Tamen, tiu rapidemo, Rin pensis, estas des pli bonvena por ŝia familio. La venontan jaron ŝi estos sepdekjara: la aĝo por pilgrimi al la Kverka Monto, sed se la tempo venus sen alporti edzinon al ŝia filo, kion fari, ŝi ne sciis kaj estis agitata de sinurĝa maltrankvilo. Jen tiam venis la ĝusta sciigo pri virino de konvena aĝo! — kaj kiam ŝi pripensis, ke baldaŭ tiu virino, akompanate de sia patro aŭ iu alia, venos de trans la montaro, ŝi senpez-iĝis kvazaŭ tuta ŝarĝo defalis de sur ŝiaj ŝultroj. Nun ŝia plej granda malfacilaĵo jam estas solvita en ŝia menso, ke alia virino venos al ŝia familio — pli reale ol, ke novedzino al ŝia filo.

La plejaĝa nepo de Rin estis Kesakiti, deksejara; sekvis du aliaj buboj kaj laste etulino, kiu aĝis nur tri jarojn. Tatuhei, por kiu estis malfacile trovi postedzinon, ŝajnis rezigninta en la lasta tempo, kaj li estis apatia. Kion ajn li faru, li estis malvigla. Rin kaj ĉiuj aliaj vilaĝanoj estis rimarkintaj tion. Sed nun li jam revigliĝos, kaj tia perspektivo spronis ankaŭ Rin al ŝia propra impetiĝo.

En la vesperkrepusko, Tatuhei revenis hejmen de la monto. Li sidiĝis sur la stumpo, kiam ŝutiĝis el dominterne la laŭta voĉo de Rin duŝe sur lian dorson:

— Hej, filo, el la transa vilaĝo venos via edzino! Ŝi vidvigiis nur antaŭhierau, sed oni diris ja, ŝi venos kiam pasos la 49-a funebrotago!

Rin estis plenplena de fiero, raportante al li pri lia novedzino — kvazaŭ pri ia triumfo. Tatuhei sin turnis:

— Ĉu ŝi venos? El la transa vilaĝo? Nu, sed kian aĝon oni diris?

Rin dume elkuris apud Tatuhei.

— Tama estas ŝia nomo, ŝi estas

*) Debutnovelo, per kiu la aŭtoro, profesia gitaristo, gajnis la unuan premion en la 1956-literatura konkuro de la monata revuo “Chūō Kōron”; publikigita en N-ro Nov., 1956. Tradukrajto por “Oomoto”, akirita kontrakte kun “Chūō Kōron”.

kvardekkvin, samaĝa kiel vi!

Tatuhei ridetis:

—Jam amumo ne reffloras al mi en tia aĝo, hahaha...

Kun certa pudoro, li ŝajnis esti feliĉa, agordante sin kun Rin en la parolfluo. Ĉu tamen lian menson — Rin instinkte demandis sin pro sia maljunulina intuicio — obsedas ankoraŭ io aparta, krom la afero preni al si postkunulinon; sed ŝi jam estis tro ekstaza de ĝojo.

En la Kverka Monto loĝis dio. Neniu vilaĝano dubis tion tial, ke ĉiu, kiu iris al la Monto, revenis, lin vidinte. Ĉar la dio reale ekzistis, lian festivalon la vilaĝanoj observis kun tia speciala fortostreĉo, kia estis nevidebla en ĉiuj aliaj eventoj de la vilaĝo. Tiom, ke la cito de la nura vorto festo jam indikis ekskluzive la festivalon de Kverka Monto. Kaj ĉar ĝin senpere sekvis la Bon-festivalo, ĝiaj kantofrazoj kaj la Bon-dancaj kantoj estis intermiksiĝintaj.

La Bon-festivalo okazis de la dektria tago ĝis la deksepa en la sepa monato laŭ la luna kalendaro. La festivalo de Kverka Monto estis la nokta festo, kiu okazis la antaŭan vesperon de la Bon-festivalo: la dekduan de la sepa monato. La festomango konsistis el la fruaŭtunaj montoproduktaĵoj — sovaĝaj, kiel kaŝtanoj, vinberoj, pasani-kaj torej-glanoj, unuaj fungoj, kaj krom ili, speciale, — la polurita blankrizo, kiu en la vilaĝo estis la rara nutraĵo. Rizo, se eĉ kultivata, alportis nur malgrandan rikolton en tia mizera vilaĝo, kaj la blankrizon la vilaĝanoj respektive alnomis la Blanka Lilio. Ili do ĉiutage manĝis ĉefe ketoklon, ekino-klon kaj maizon, da kiuj ili povis abunde rikolti en la montara regiono — sen ebenaj kampoj, kaj la blankrizon nur en la festivalo de Kverka Monto; sed en la ordinaraĵoj tagoj ĝin povis manĝi ja neniu,

krom en la ekstreme senhelpa kazo de grava malsano. Jen unu Bon-danca kanto diris:

*Mia paĉjo — sentaŭgulo,
tri tagojn malsanetis;
dum li fartis senokupe
li rizon jam elpetis.*

Ĝi estis kanto, kiu admonas kontraŭ malŝparemo. La patro en la kanto estas primokata kiel ekstravaganculo aŭ kreteno, kiu facile pretekstis sian malsaneton por povi manĝi blankrizon. Ĝi estis uzata en diversaj okazoj, kiel proverbo; ankaŭ por averti la filon aŭ fraton kontraŭ mallaboremo:

*Mia fraĉjo — sentaŭgulo,
tri tagojn malsanetis:
dum li fartis senokupe
li rizon jam elpetis.*

Ĝia kantado celis subaverti: “Jen vidu, li kutimiĝis mallabori; tia ulaĉo estas la tipo kiu baldaŭ dirus, ke li volas manĝi la Blankan Lilion”. Ĝi estis aplikata ankaŭ por admoni la filojn en okazoj, se ili estis malobeaj, aŭ kontraŭpredikis, al siaj gepatroj.

De la festivalo de Kverka Monto ekzistis la sola kanto: “floras jam la kaŝtano-arbo”, sed el ĝi la vilaĝanoj jam komponis ŝercajn parodiojn tiel, ke troviĝis multe da variaĵoj.

La domo de Rin staris ĉe vilaĝfino; do estis preterpasejo de preskaŭ ĉiuj vilaĝanoj irantaj al la montoj por ĉiutaga laboro. Apenaŭ unu monato restis antaŭ la festivalo de Kverka Monto, kaj ĉar unuan kanton oni jam kantis kiel Rin aŭskultis, ĝin sekvis poste ĉiuj aliaj kantoj unu post la aliaj elzume de la vilaĝanoj. Rin povis aŭdi ilin:

*Avnjo Tori de l' Sal-domo
ĉe l' monton iris, preĝis;
kia granda beno por ŝi,
ke tiam tuj ekneĝis!*

En la vilaĝo, la esprimo “iri al la monto” havis du tute malsamajn signifojn. Ilin la vilaĝanoj povis facile distingi, kvankam la prononco kaj la akcento de ambaŭ estis tute sama. Unu signifis: iri al la monto por ĉiutaga laboro — kolekti brulbranĉaĵojn aŭ fari lingnokarbojn, kaj la alia: pilgrimi al la Kverka Monto. De generacio al generacio oni rakontis, ke se ekneĝis la tagon, en kiu iu pilgrimis al la Kverka Monto, li aŭ ŝi estas feliĉa homo. Tiutempe ne troviĝis ĉe la Sal-domo tia virino nomata Tori, sed oni diras, ke ŝi reale vivis antaŭ pluraj generacioj kaj la neĝo falis ĝuste kiam ŝi iris sur la Monton, tiel ke ŝi fariĝis la klasika ekzemplo de feliĉa homo kun sia nomo eternigita en la kanto. Neĝo tute ne estis maloftaĵo en la vilaĝo; ĉiu vintro alportadis ĝin de tempo al tempo kaj la tutan vintron la montosuproj restis blankaj. Tamen, en la okazo de Avnjo Tori, la neĝo ekfalas la momenton kiam ŝi atingis la supron de la Kverka Monto. Ŝia estis ideala okazo; ĉar se ŝi estus irinta la vojon dum neĝado, ŝi ne povis esti feliĉa. Kaj la sama kanto entenis ankoraŭ alian signifon. Ĝi aludis, ke por fari pilgrimon al la Kverka Monto, oni evitu kiom eble someron, sed elektu vintron. Laŭ tio, ĉiuj, kiuj ĝis nun iris al la Monto, elektis la horon, kiu plej aŭguris la ŝancon de neĝfalo. La Kverka Monto, kie loĝis la dio, estis monto neniel atingebla, se la vojo estis kovrita tute per neĝo. Ĝi kuŝis en la longa distanco for de la vilaĝo trans sep valoj kaj tri lagoj. Oni do nepre bezonis iri la longan vojon sen neĝo kaj la neĝo devis fali en la momento kiam oni atingis la Monton, por ke oni estu

kalkulata kiel feliĉulo. Tiel la kanto donis ankaŭ instrukcion pri la horo kun sufiĉa limigo: iru tuj antaŭ neĝfalo.

Rin jam delonge anticipis la tagon de ŝia pilgrimo al la Monto. Ŝi devis fari kvanton da festo-sakeo por regali la gastojn kiam ŝi foriros. Ankaŭ la pajlomaton por sursidi sur la Monto; ĝin ŝi jam havas propramane pretigitan de antaŭ pli ol tri jaroj. Pridecidi postedzinon por la vidviĝinta Tatuhei ankaŭ estis parto de ŝiaj preparoj. Sed nun, kiam la festo-sakeo, la pajlomato kaj la novedzino de la filo jam estas pretaj, restas nenio por fari krom ankoraŭ sola afero, kiun ŝi nepre finu antaŭ ol ŝi foriros.

Observinte ke neniu ŝin rigardas ĉirkaŭe, ŝi ekprenis fajrosilikon en la mano. Ŝi malfermis larĝe sian buŝon, kaj per la fajrosiliko ekbatadis siajn antaŭdentojn de ambaŭ vicoj — la supra kaj malsupra. Krak! Krak! Ŝi volis detrui siajn fortajn dentojn per la frapegado. Ĉiu bato vibrigis abomenan doloron akre en ŝian kranion. Eltenadu ĝin, nur batadu kaj la dentoj iam estos disbreĉitaj — ŝi esperis. Ĉiu eta breĉiĝo donadis al ŝi tiom da kontento, ke jam en la lasta tempo la postdoloro eĉ havigis al ŝi iluzion plezuron.

La dentoj de Rin estis sanaj — malgraŭ ŝia maljuniĝo. De ŝia junaĝo, ili estis ŝia fiero. Ili taŭgis por dismaĉi krakigante eĉ la sekajn grajnoj de maizo; tiel bonaj ili estis. Kaj ne eĉ unu elfalis plu post ŝia maljuniĝo, kio tamen fariĝis nun ega hontindaĵo por ŝi. Ŝia filo Tatuhei jam havas kelkajn vakantaj dentojn, dum ŝi — kun tiaj solidaj vicoj da dentoj, ŝi timis, mienos al aliaj, kiel se ŝi estus nevenkebla batalanto kontraŭ pladoj, aŭ ŝi povus manĝe mordi kion ajn. Eĉ tia ŝajno estis io skrupule hontinda en ŝia vilaĝo, kie malabundis la nutraĵo. Iufoje

al ŝi diris vilaĝano rekte en la vizaĝon:

—Kun tiaj dentoj, ha, vi hezitos je nenio! Eĉ la pinfruktoj kaj furzpizoj etetiĝos en nenion, eh?

Tio ne estis amika ŝerco, sed moko — certe ne senmaliceta. La “furzpizoj” estas speco de la pizo, plej malmolaj kaj sen-gustaj kiel ŝtonetoj. Kiu ajn ilin manĝis, tiu konstante ellasas furzon, kaj tiaokaze, oni kutimis diri: “Jen vi havis furzpizojn!” En ordinara okazo oni uzis unu el la du aliaj dialekte-komunaj nomoj pri tiu pizo. Tial, laŭ la “furzpizo” intence uzita, Rin — kiu cetere furzis neniam en alies apudeco — bone sciis, ke oni mokis ŝin, tiom pli, ĉar ŝi jam antaŭe aŭdis similan diraĵon el pluraj personoj. Ili tamen ridindigas ŝin ne senkaŭze, — Rin pensis, tial, ĉar ŝi havas ankoraŭ nun tiel sanajn dentojn, kiuj maldecas al ŝia aĝo — la tioma aĝo, ke ŝi baldaŭ devas pilgrimi al la Kverka Monto.

Ankaŭ ŝia nepo Kesakiti iam ŝin petolis:

—Ej, vi havas tridek tri dentojn, Avnjo!

Eĉ la nepo montris al ŝi tiel arogan frunton. Ŝi tiam enigis fingron en sian buŝon, kaj kalkulis palpante la dentojn. La nombro de ŝiaj dentoj estis dudek ok nur — la supraj kaj la malsupraj kunope. Ŝi rebatis:

—Ne furzu stultaĵon! Nur dudek ok mi havas.

Kesakiti fariĝis pli rikana:

—Ba, vi ne scias kalkuli pli ol dudek ok! Pli da ili vi havas!

Li volis petoli ŝin ĉiam insistante, ke ŝi havas tridek tri dentojn. Dum la pasintjara Bon-festivalo okazis, ke li improvizis dancokanton, kaj ĝi kaŭzis tian ridegon, kiu sternis ĉiujn kundancantojn:—

Mia avnjo ĉe angulo

*de la dormejoj eksidis,
ŝi kalkulis monstraĵajn dentojn:
ja tridek tri solidis.*

Ĝi estis parodio, kiun Kesakiti faris el la plej malserioza kanto de la vilaĝo. La originalo estis senhonta insulto al la patrino: mia panjo ĉe angulo de la dormejoj eksidis, ŝi kalkulis la —ojn: ja tridek tri —didis. Kesakiti ĝin kantis modifante per la vortoj “avnjo” kaj du aliaj, kaj tiel gajnis la grandan aplaŭdon. Tial, al li mem lia kanto iĝus malplena sen tio, ke lia avnjo havas tridek tri dentojn. Plie, ĝin li jam disfamis inter ĉiuj vilaĝanoj: Rin havas tridek tri dentojn!

Kiam Rin ĉi tien venis edziniĝe, siatempe ŝi ĝuadis la onidiron, ke ŝi estas la plej bela, modesta virino en la vilaĝo. Ankaŭ de post la morto de ŝia edzo, ŝi ne estis kiel aliaj vidvinoj: ŝi neniam estigis hontigan famon pri si, nek klaŭdon de oni pri ŝia privata vivo. Kiel do ŝi estus povinta supozi, ke ŝi iam devos esti tiom humiligata de tia afero kiel la nuraj dentoj! Tiuj dentoj, ŝi timadis, sole tiuj dentoj ĉagrenus ŝin, se ili ne lasus sin detruiri ĉiel kaj nepre antaŭ ol ŝi iros al la Kverka Monto. Kiam ŝi imagis sin iranta al la Kverka Monto, ĉiam ŝi deziris iri kiel sendenta bela maljunulino, apogiĝinta sur lignotabulo portata sur la dorso de Tatuhei. Jen la kialo, pro kiu ŝi estis, sinkaŝe, penanta diskraki siajn dentojn per la fajrosiliko.

Al la loĝejo de Rin najbaris tiu nomata la Moner-domo. Mono estis bezonata por nenio en la vilaĝo kaj neniu ĝin posedis. Sed iu el tiu domo iam vojaĝis al la provinco Etigo kaj tiam kunportis hejmen groŝan moneron. De tiam lia estis nomata la Moner-domo. La maljuna patro de la familio estis nomata Mata kaj ĉijare li

estis 70. Tial ke li kun Rin estis ne nur apudloĝanto, sed preskaŭ samaĝulo, ili delonge estis cidiraj amikoj. Tamen, okazis, ke kvankam Rin jam de pluraj jaroj sinpretige anticipis la tagon de ŝia pilgrimo al la Monto, ĉe la Monerdomo, la plej avara en la tuta vilaĝo, oni kredeble domaĝis eĉ la malŝaron por preparo de festo-sakeo uzota kiam la maljunulo iros al la Monto: oni cetere faris nenian preparon por lia pilgrimo. Antaŭe kuris la famo, ke li irus al la Monto eble antaŭ la printempo de tiu ĉi jaro; sed la somero jam venis dum li ankoraŭ ne iris. Nun, la vilaĝanoj diras malantaŭ li, ke li tamen iros iafoje dum la venonta vintro, kaj se li iros, tiam oni kaŝe forportos lin eĉ sen anonci al aliaj vilaĝanoj. Sed Rin konis trafenetre la koron mem de Mata: li estas tia karmulo,²⁾ ke li malvolas iri al la Monto. En sia koro ŝi ĉiam kompatis lin: kia stultulo! Ŝi mem estis preta iri al la Monto en la venonta novjaro, kiam ŝi fariĝos sepdek-jara.

Najbare al la Moner-domo staris domo nomata la Pluv-domo. En la sudorienta direkto de la vilaĝo kuŝis monto nomata la Sudorienta Monto. Antaŭ multaj jaroj, oni diras, iu el la familio trovis dukapan serpenton en tiu monto kaj mortigis ĝin; de tiam, laŭdire, ankoraŭ okazas, ke kiam iu el lia familio iris tien, ĉiam — ekplivas. Jen la nomo.

GLOSARO: 1) Bon-festivalo: somera festivalo kun okazigo de la popoldancoj variaj laŭ la provincoj kaj urboj; deveninta de la budaisma ĉiujara soleno por la mortintoj, nomata “ura-bon” (< Sanskrita: *ullambana*). 2) Karmulo: obstinulo (aŭ ruinulo, kruelulo, ktp) kun la fatalisma implico: nekorektebla aŭ nesavebla. Vd Supl. de P. V.

BOTANIKAJ VORTOJ: *Zelkovo Zelcova acuminata*; Pasanio *Pasania cuspidata* (aŭ pli specife, *Shiia Sieboldi* por la japana “ŝii”); Torejo *Torreya mucifera*; Ketoklo *Chaetochloa italica*; Ekinoklo *Echinochloa Crus-galli edulis*. Ketoklo kaj ekinoklo, same kiel milio, estas konataj al ni kiel la nutraĵo precipe por hejmaj birdoj.

Al tiu, najbaris domo nomata la Torejarbo — fama per kanto. Troviĝis entute dudek du domoj en la vilaĝo, sed neniu havis apud si tiel gigantan arbon, kiel la torejarbo, kiu staris ĉe tiu domo. La kanto diris:

*Avnjo Gin de l' Torejarbo
nur estas sterkitino:
filojn, nepojn kaj ratidon
ŝi nutris en la sino.*

La maljunulino kun la nomo Gin ankoraŭ vivis en la tempo kiam Rin kiel novedzino venis en la vilaĝon. Avnjo Gin estas stulta virino, kiu postlasis sian famon en kanto per la finomo: sterkitino. La vorto “ratido” signifis la filon de la nepo: pranepo, kaj aludis familion, kiu — kiel tiu de la rato — estis naskema je multaj idoj. En la vilaĝo malsufiĉis tiom ekstreme la nutraĵo, ke oni, vivante tiel longe kiel ĝisvidi pranepon, meritis la komunan mokridon: la fekundemo kaj frumatureco travejis la familion por kuntreni la tri generaciojn. Avnjo Gin ja generis la filojn, vartis la nepojn kaj ĉirkaŭprenis pranepojn en sia sino, kaj devis esti humiligata kiel virino, kiu lasis sin nur produkti fraĵon da volupt-amaj idoj. La vorto “sterkitino” havis la sencon: virino gravediĝema aŭ volupt-ema. (*Daŭrigota*).

Eljapanigis T. Mikami

Listo de japanaj urboj mondanigitaj

(Daŭrigo)

(168) Taiji-maĉi, urbeto en Ŭakajama-ken, 30, aprilo, 1959. (169) Ŝiŭa-maĉi, urbeto en Iŭate-ken, 23, majo, (170) Nakabeji-maĉi, urbeto en Ŭakajama-ken, 28, majo. (171) Takehara-maĉi, urbeto en Hiroŝima-ken, 29, majo. (172) Tanabe-ŝi, urbo en Ŭakajama-ken, 9, junio. (173) Jacuŝiro-ŝi, urbo en Kumamoto-ken, 15, junio. (174) Toŝima-ku, kvartalo en Tokio, 26, junio. (175) Taira-ŝi, urbo en Hukuŝima-ken, 1, julio. (176) Hitojoŝi-ŝi, urbo en Kumamoto-ken, 8, julio. (177) Kugamaĉi, urbeto en Jamaguĉi-ken, 21, sept. (178) Kume-maĉi, urbeto en Okajama-ken, 22, sept. (179) Kuji-ŝi, urbo en Iŭate-ken, 30, sept. (180) Kainan-ŝi, urbo en Ŭakajama-ken, 6, okt. (181) Ŭakajama-ŝi, urbo en Ŭakajama-ken, 24, okt. (182)

Hacukaiĉi-maĉi, urbeto en Hiroŝima-ken, 9, nov. (183) Ŝingu-ŝi, urbo en Ŭakajama-ken, 10, nov. (184) Sunagaŭa-maĉi, urbeto en Tokio, 26, nov. (185) Ooŝima-maĉi, urbeto en Jamaguĉi-ken, 10, dec. (186) Mijoŝi-maĉi, urbeto en Tokuŝima-ken, 15, dec. (187) Bizen-maĉi, urbeto en Okajama-ken, 16, dec. (188) Iŭakuni-ŝi, urbo en Jamaguĉi-ken, 17, dec. (189) Sakaide-ŝi, urbo en Kagaŭa-ken, 21, dec. (190) Arita-ŝi, urbo en Ŭakajama-ken, 22, dec. (191) Haŝimoto-ŝi, urbo en Ŭakajama-ken, 24, dec. (192) Taĉibana-maĉi, urbeto en Jamaguĉi-ken, 24, dec. (193) Micu-maĉi, urbeto en Okajama-ken, 24, dec. (194) Naĉi-Kacuura-maĉi, urbeto en Ŭakajama-ken, 25, dec. Unu prefektujo mondanigita: (10) Ŭakajama-ken, 10, okt. 1959.

LA PRAKTIKO

La Gazeto de la Mondpopolo

Abonprezo por unu jaro: 24 Steloj
Japanaj ges-anoj sendu ¥ 580
al la Redakcio de OOMOTO

Eldonejo:

UNIVERSALA LIGO

Riouwstraat 172, Den Haag,
Nederlando

OOMOTO

Bonvolu pagi viajn abon-kotizojn al:

OOMOTO,

Kameoka, Kioto-hu, Japanujo;

INTERNACIA ESPERANTO-
INSTITUTO,

Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando;

UNION ESPERANTISTE
FRANÇAISE,

34, Rue de Chabrol, Paris 10e, Francujo;

S-ro ELAM FONSECA,

Caixa Postal 68, Tupaciguara,
Minas Gerais, Brazilo;

Aŭ al ĉiuj gazet-perejoj
tra Esperantujo.